BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL V-11200/19
(1926)

INTER-NACIA MONDLITERATURO

# DINKO ŜIMUNOVIĈ:

# ANO DE L'RINGLUDO

FERDINAND HIRT & SOHN
LEIPZIG
ESPERANTO-FAKO

27/8.60.

L

*Internacia Mondliteraturo*

*Volumo 19*

# INTERNACIA MONDLITERATURO

Kolekto de la plej famaj verkoj
el ĉiuj naciaj literaturoj

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO

DINKO ŜIMUNOVIĈ

# ANO DE L'RINGLUDO

El la kroata originalo tradukis
kun permeso de la aŭtoro

**Fran Janjiĉ**

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG / 1926
ESPERANTO-FAKO

ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVATAJ
COPYRIGHT 1926 BY FERDINAND HIRT & SOHN
MADE IN GERMANY

V - 11200

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

PRESEJO BREITKOPF & HÄRTEL, LEIPZIG

# ANTAŬPAROLO

Dinko Ŝimunoviĉ naskiĝis 1873 en la urbeto Kuin en Dalmacio. Patro lia estis instruisto, kaj la filo ankaŭ sin dediĉis al la sama profesio. Unue li estis instruisto en la vilaĝo Hroaci apud la urbeto Sinj, kaj nun li estas instruisto en Split.

Dinko Ŝimunoviĉ estas unu el la plej bonaj nuntempaj jugoslavaj novelistoj. Nia bonega kritikisto kaj verkisto A. G. Matoŝ bone karakterizis, kion novan Ŝimunoviĉ alportis en nian literaturon kaj en kio estas lia forto: „Ŝimunoviĉ havis la feliĉon naskiĝi en la regiono primitiva kaj ankoraŭ hodiaŭ legenda, sur estingiĝinta fajrujo de kroataj naciaj reĝoj.“ „Ĝi estas la regiono de hodiaŭa kulturo netuŝita kaj neprizorgita, sed pro tio tie la popola kroata animo ankoraŭ restis netuŝita, antikva, la lingvo pura kvazaŭ meze de Hercegovina, kaj la loĝantaro ŝtoneca kaj belega kvazaŭ en antikvaj, heroaj tempoj.“ „En tiu forta, sana, en la tuta Eŭropo la plej forta kaj la plej bela popolo, kie ĉe montaraj maljunuloj eĉ nun troviĝas harligoj, oni vivas kiel antaŭ tricent jaroj, kaj legante tiujn rakontojn vi verŝajne ne kredos, ke ili povas okazi en nia tempo. Ŝimunoviĉ al ni malkaŝis la misteron de l' animo de la plej kroata, el la kroatoj, gento, kaj tiu rakontrealismo efikas per la popolpoezio. Ankaŭ iuj aliaj verkistoj priskribas tiajn motivojn, sed neniu el ili havas tian senton por ĉio, kio estas en tiu forta raso ankoraŭ fortega, energia kaj sana.“

Lia unua novelo „*Mrkodol*“ (Mallumvalo) tuj altiris la atenton en la jugoslava literaturo. En ĝi la aŭtoro priskribis la malvastanimecon de la popolo en la vilaĝo Mrkodol, en kio li bone sukcesis. Sed, kio estas la plej efika en tiu novelo, estas spertega originala pejzaĝpriskribado. — Sekvas liaj aliaj verkoj „*Tudjinac*“ (Fremdulo), „*Gjerdan*“ (Ĉirkaŭkolo), „*Mladi dani*“ (Junaj tagoj) kaj „*Mladost*“ (La juneco). Ĉiuj estas libroj de noveloj.

Nian novelon „Ano de l' ringludo“ *(Alkar)* mi prenis el la kolekto de noveloj „*Mrkodol*“, kiu estas tradukita en la rusan, ĉeĥan kaj germanan lingvojn. Mi tradukis ĝuste ĝin, ĉar ĝi estas la plej bela novelo de D. Ŝimunoviĉ, kaj ĉar la aŭtoro en ĝi priskribis plej bele la parton de nia popolo en heroa regiono apud la rivero Cetina, kie ankoraŭ restis, de nenies influo tuŝita, la pura heroa animo de nia popolo. Tion la aŭtoro, mem kreskinta inter tiu popolo, bonege sciis surpaperigi, kaj tiel li donas nun ankaŭ al la tutmonda Esperantistaro okazon, por ĝui ion originalan kaj al ili eksterordinaran.

*Fran Janjiĉ.*

## 1.

La grandega kampo de Sinj, sub la varmega somera suno, ŝajnis ankoraŭ pli granda, ĉar la blueta nebuleto kaŝis al la okuloj la malproksimajn montojn. Ĉio estis trankvila en la posttagmeza varmego, kaj malproksimaj, malproksimaj ŝtonaj montoj plibluiĝis, rigardetante depost la malalta kaj maldika nebuleto. Ŝajnis, ke la tuta regiono estas en luksa somera dormo aŭ ripozas post forta batalo kaj farita heroaĵo.

Ĉe la fino de tiu kampo tiriĝas trankvile malgranda rivero, de kiu la forta suno levadis la bluan nebulon, por tra ĝi ekludi kun siaj radioj. Ĝi estas Cetina, kiu donas la nomon al la tuta vasta regiono, malproksime kaj larĝe ĉirkaŭ si.

Apud la kampo estas vilaĝo ĉe vilaĝeto, monto ĉe monteto kaj kastelo ĉe kastelo. Fine estas la vilaĝoj Han kaj Ĉitluk, kunigitaj per granda ponto, — sub ili estas Begluk apud la montpinto de Kadija, kun detruita Hasan-kastelo, kaj ankoraŭ pli malsupre la vilaĝo Odĵak, kun Ali-fonto en la mezo.

Kaj tiel plu en la granda regiono.

Kaj pensante pri tiuj nomoj, vi kvazaŭ aŭdas la voĉon de hodjio[1]), kiu resonis iam inter tiuj montoj kaj perdiĝis en la vasta kampo.

Kaj se vi ie inter la montoj aŭdus plilongigitan heroan kanton, kiu rememorigas la malliberejon kaj katenojn, la sangon kaj ponardojn, kaj vidus iranta en inter-

[1]) Mohametana pastro.

montaĵon fortan junulon kun brilaj arĝentplatoj kaj longa pafilo kun la tubo el Damaska ŝtalo, vi sentus la proksimecon de la sorĉa kaj heroa Oriento.

La Cetinaanoj ja eĉ nun ne pensas kiel trankvile vivi, sed ili vivas trankvile, ĉar ili devas, kaj ĉar estas neniu, kun kiu ili povus batali.

La Turkoj jam delonge foriris, sed antaŭe bruligis en ili sopiron je batalo kaj gloro, je forteco kaj venĝo. Ilin turmentis tiu sopiro kaj delogis je kio ajn, kion oni ne nomus heroeco en regionoj, kie neniam estis turkoj.

Tamen la regiono ŝajnis trankvila kaj dormema en la varmego de l' somera suno, sed kvazaŭ ĝi estas ripozanta post la batalo kaj farita heroaĵo.

Ĵus tiun jaron finiĝis la centsesdeka jaro, de kiam Cetinaanoj elpelis Turkojn, kaj ĝi estis la lasta granda batalo, ĉar pli malgrandaj ankaŭ pli malfrue okazadis. Kaj poste Cetinaanoj estis nur unu tagon da irado malproksimigitaj de turka limo.

Kaj tiu lasta granda batalo estis tiel terura kaj stranga, ke pri ĝi eĉ nun oni rakontas la legendon: ilia Virgulino en fortan turkan tendaron sendis la kormalsanon kaj ekminacis al la Turkoj per la glavo de la kastelo, kaj estis pereigita granda turka militistaro. Verŝajne tiun legendon oni rakontis ofte, ĉar ne estas en Cetina plenkreskinta persono, kiu ne konas tiun legendon.

Sed pli multe ol tiun legendon, oni ripetadis ĉiujare la heroan ludon „ringo“, rememoraĵo je tiu tempo de cetinaa gloro.

Estis la tago en Aŭgusto, kiam la Cetinaanoj, vestitaj per brilegaj vestoj de antikvaj herooj, sur ĉevaloj en kurado, per lanco trafadis en la feran ringon. Sed vetkuradis kaj trafadis nur riĉaj urbanoj kaj junuloj el plej bonaj domoj el la vilaĝo, al kiuj urbanaj parencoj volis prunte-

doni ringludan veston kaj multekostan ornamaron por bona ĉevalo.

Kaj da bonaj ĉevaloj en ebena Cetina estis multe. La plej granda parto ja de Cetina-kampo estis freŝaj herbejoj, sur kiuj ĉiun someron paŝtiĝas grandaj amasoj da rapidaj ĉevaloj. Kaj da viglegaj fraŭloj estis multe, kiuj sur ili vetkuradis kaj transsaltadis la fosojn kaj arbustojn. Nur fraŭloj, kiuj transrajdadis la kampon, bezonis tiujn brilajn vestojn, por ke ili povu ankaŭ ĉe la „ringo" montri sian heroecon.

Kaj kiel tio estis bela antaŭ miloj, kiuj kolektiĝas por vidi tiun belegan vetkuradon!

Tiun kampon nun varmigis la forta suno, tiel ke super ĝi tremis la aero pro la varmego de l' bruligita tero. El malproksime ĝi ŝajnis sen io viva, sed sub la salikoj apud Cetina kaj ĝiaj alfluantaj riveretoj ripozis ĉevalistoj kaj kelke da paŝtistinoj, apud ĉevaloj, kiuj kuŝiĝis turmentitaj de la varmego kaj matena kurado. Tie, ankoraŭ ĉe „La Etaj herbejoj" ĉe l' fino de la kampo, muĝis la Paŭŝino-fonto, apud kiu rigidiĝis aroj da malaltaj salikoj kaj altaj poploj. En iliaj malhelaj kaj mallongaj ombroj tri ĉevalistoj el la vilaĝo Begluk atendis la vesperan ventumeton, por denove transrajdi la herbejojn kaj forakompani belajn paŝtistinojn al ilia vilaĝo.

Kuŝiĝintaj, en nuraj blankaj debutonumitaj ĉemizoj kaj bluaj drapaj kalsonoj, interparolis tiuj fraŭloj pri la ĉevaloj kaj herbejoj, pri la amuzado kaj fraŭlinoj, kaj pri ponardoj kaj pafiloj. Ili parolis longe, ĝis la plej juna el ili eksilentis kaj ekrigardis fikse al la rivero, kie io blanka ekaperis inter la herboj kaj moviĝis, foje en ombro, foje en sunlumo.

Tio estis paŝtistinoj kaj lavistinoj el Begluk, kiuj ĉiutage ĉirkaŭ la tagmezo sin senvestigis, por sin bani en

tiu kurbiĝo de Cetina. Kaj la pupiloj de Salko kunpremitaj pro la lumo plilarĝiĝis, por pli bone vidi tiujn belajn paŝtistinojn, kiuj sin senvestigis inter la herboj.

Salko estis fraŭlo kun ankoraŭ infana vizaĝo, sed kun la staturo tiel forta, ke aliaj fraŭloj per io ajn elturniĝus, se okazus lukto kun li. Kun abunda kaj blonda hararo kaj sen lipharoj, kun brilantaj grandaj okuloj kaj longaj okulharoj, kaj plenaj brakoj krucmetitaj sur la blanka plena brusto — tiel kuŝante surdorse — li similis al obstina fraŭlino, kiu incitetas sian karulon.

Kunuloj liaj estis same belaj kaj fortaj fraŭloj kiel li mem, sed iomete pli maljunaj ol li. Sed ĉiuj tri estis bonaj amikoj, plenkreskintaj en la sama vilaĝo kaj ankoraŭ dum la infanaĝo ili kune transkuradis la kampon, kaj unu superadis la alian sen envio kaj disputo. Okazis eble eĉ infanbatoj, sed pro bagatelaĵo, kion ili plu eĉ ne rememorigas.

La tagmeza suno bruligis kaj lacigis ĉion vivan en tiu kampo, kaj la herbejoj, haladziĝante tra kavoj, sufokis per sufokiga odoro.

Sed tiuj viglegaj fraŭloj sentis nek lacon nek varmon. Ili ridis feliĉaj kaj kontentaj, rememorante fraŭlinojn en siaj vilaĝoj kaj rakontis, kion ĉion ili aŭdis aŭ parolis dum amuzvesperoj de lastaj tagoj.

Ili sciis, ke Salko estas enamiĝinta en Marta, la plej bela fraŭlino en Begluk, kaj ili ŝin ne menciis antaŭ li. Sed ili sciis ankaŭ tion, ke li estas nur dekokjara, kaj ke ŝi estas du jarojn pli aĝa kaj ne estas eble, ke ŝi estu lia edzino. Kaj ankoraŭ: La patro de Salko estis hajduko kaj estas terure maldelikata homo, kaj la patrino de Marta estas sorĉistino, kaj la fraŭloj foriĝis de ŝia domo kaj ŝiaj rigardoj. Tial ili parolis pri ilia amo nur ŝerce.

Sed Salko kaj Marta ne amis sin nur ŝerce.

Salko foje preskaŭ dronis, naĝante trans Cetina al Marta, kaj Marta ĝoje ekridetas ĉiam, kiam ŝi ekvidas Salko-n.

Sed tion iuj ne sciis, kaj iuj eĉ ne kredis, ke ili ambaŭ sin ĉirkaŭprenadis ĉiun tagon pli kaj pli forte, malhelpataj de nenies vido kaj subaŭskulto. Ili sin ĉirkaŭprenadis ankaŭ ĉi tiun someron en multaj ŝirmitaj ombroj apud Cetina. Tie lin atendadis Marta, post kiam ŝi sin banis, kaj Salko miris, kiel ŝi bonodoras.

Kaj ŝi la sanecon kaj junecon odoris.

Kaj nenio malbona estis en tiu amo, kiun ili efektivigadis nur per sennombraj kisoj.

Pro tio Salko nun ekfariĝis maltrankvila, ĉar alproksimiĝis la tempo de ilia kunveno, kaj en li kreskis pli kaj pli la deziro je la kisoj de Marta. Pro tio ankoraŭ pli, ĉar jam estas la deka tago, ke li ŝin ne vidis, kaj ĉar li antaŭsentis, ke Marta lin evitas vole, kaj li ne sciis pro kio.

Juriŝa kaj Gare kuŝis sub la salikoj en antaŭa interparolado, eĉ ne rimarkante la maltrankvilon de Salko.

De sub tiuj salikoj, kie ili kuŝis, vidiĝis la kampo, nur kelkloke barita de la vicoj de l' arboj kaj de la nebulradiaro. Sed nenion alian de tie oni povis vidi, kaj al tiuj fraŭloj tiu kampo ŝajnis la tuta mondo, en kiu ili estas mastroj de tiu spaco kaj de tiu trankvilo. Tial ili, pensante ĵus pri nenio, parolis ion ajn, por ke pasu tiu longa somera tago.

Kaj la tago estis tia, ke plej bele estis, kuŝi ĝuste tie apud la Paŭŝino-fonto, kaj atendi, ĝis la suno elverŝos tutan sian forton sur tiun grandan teron. Kaj la vespero ĉiel alvenos, kaj la paŝtistinoj ne forkuros pli frue, ol kiam ĝi subiros.

Sed ankoraŭ malproksime, tre malproksime, estis ĝis tiu tempo, kiam subiras la suno, kiu ĵus nun plej forte bruligis la sekan kaj krevintan teron.

La ĉevaloj, ankaŭ diversmaniere etendiĝintaj, spiregis trankvile, sed ne la nigrulo de Salko, kiu paŝis inter la salikoj, kviete ĉevalblekante kaj fosetante per la piedo. Stranga estis tiu ĉevalo, ne multe pli granda, tamen multe pli bela ol la ceteraj ĉevaloj de Cetina. La patro de Salko ĝin, unu malluman nokton, dum li ankoraŭ estis hajduko, alkondukis en sian domon. Ĝi estis ĉevalo de iu bejo[1]) de Livuo, kiun li apud Prolog mortigis, poste kun la ceteraj hajdukoj dividante lian trezoron.

Oni rakontis, ke ĉe la bejo estis mil oraj dukatoj, krom arĝenta armilaro kaj ore brodita vesto, sed la hajduko Raŝica — kaj li estas la patro de Salko — pli ŝatis tiun nigrulon. Nur tiun nigrulon li prenis al si, kaj la alion li lasis al la kunularo, por dividi inter si ĉion ceteran. Kaj neniu diris, ke Raĉica fáris malbone. Sed oni rakontis ankaŭ tion, ke la bejo al li mortante diris: „Mia nigrulo ne alportos en vian domon la feliĉon".

Ĝi estis ĉevalo ankoraŭ juna, maldika kiel knabino, kun malgranda kapo kaj maldikaj piedoj, kaj en ĉio alia bela, ke vi povus ĝin tutan tagon rigardi kaj tio vin ne enuigus. Brila kaj nigra kiel matura groso, kaj rapida — Dio! oni ne povas vidi ĝin, dum ĝi kuras. Kaj iomete da fojno al ĝi sufiĉas kaj laciĝos ĝi neniam, se vi rajdos sur ĝi tri longajn tagojn sen ripozo.

Nur pura ĝi deziris esti, kvazaŭ ĝi scias, kiel ĝi estas bela. Kaj karesata esti ĝi ŝatis, escepte je la komenco, kiam ĝi ankoraŭ ne forgesis sian bejon. Sed ĝi baldaŭ alkutimiĝis al la karesado de Salko kaj Raŝica. Kaj ili ne nomis ĝin nigrulo sed Arap, nur pro amo. Ili ja nek vidis nek aŭdis, ke iu alia posedas similan ĉevalon. Ĝi estis ĉevalo ruza, tiel saĝa, ke ĝi eĉ sciis, kion pensas

[1]) bejo = turka titolo.

ĝia mastro. Se vi ĝin vokas laŭ ĝia nomo, tuj ĝi alvenas, aŭ se vi paŝas al ĝi kun la jungilo, ĝi etendas la kapon kaj malfermas la buŝon, kaj cent da aliaj aferoj. Sed se ĝi ekvidas ion, kion ĝi ankoraŭ ne vidis, aŭ aŭdas ian eksterordinaran bruon, escepte la pafadon de pafiloj, ĝi disŝiros eĉ la jungilon, kaj vi ne plu atingos ĝin kun la okulo. Sed la pafadon ĝi ne timis, sed nur ekmovadis la orelojn, iomete ekĉevalblekadis kaj ekfosetadis per la piedo, kvazaŭ ĝi estas en la batalo. Sed en la batalo ĝi ne estis, escepte tiun nigran nokton, kiam estis mortigita ĝia bejo, ĉar ĝia bejo estis heroo kaj ne timis, ĝis lin trafis hajduka kuglo en la koron.

Tia estis la ĉevalo, kiu ĉirkaŭ Salko fosetis per sia maldika piedo kaj kviete blekis, sciante, ke ĝi ankaŭ tiun posttagmezon transkuros la herbejojn ĝis tiu kurliĝo de Cetina. Kaj Salko ekrigardis sian Arap kaj ekesperis, ke lin atendos Marta.

Li sin levis trankvile, prenis la nigrulon ĉe la kolhararo kaj saltis sur la nudan Arap, dirinte al Gare kaj Juriŝa nenion, same kiel ĝis nun, kiam li foriradis. Arap nur malalte mallevis la kapon, fleksante sian belan brilan kolon kiel arĉon, kaj ekrapidegis trans la ebenaj herbejoj, transsaltante malgrandajn, senakvigitajn fosojn. La sekaj herbejoj ektondris malklare, kaj la blanka ĉemizo de Salko kaj la blonda longa hararo rebrilis en plena lumo de la somera tagmezo.

Sed iom poste haltigis Salko sian ĉevalon en la kurado kaj ekrajdis malrapide, ĉar ia forta ĝojo plenigis lian bruston, kaj li volis kanti:

Herbo kreskas trifolio,  
Sin tri pavoj sur ĝi paŝtas,  
Kaj krom tiuj kvar pavetoj.

Ilin gardas knabineto;
Sur ŝi blanka ĉemizeto
Nek teksita, nek ŝpinita,
El la oro sed fandita.

. . . kantis Salko, kaj lia voĉo perdiĝis sur la ebena kampo, kaj ŝajnis, ke la kanto venas de granda malproksimo.

Kaj Salko ne kantis forte, ĉar tio estis knabina, kaj ne heroa kanto.

Kiam Salko jam malproksimiĝis en la kampon, diris Juriŝa:

— Periĉ petis de ili la nigrulon por la ringludo.

— Periĉ? Kiu Periĉ? — diris Gare.

— Marko Periĉ, ĉu vi ne konas lin? Li estas la nevo de tiu komercisto en la urbo, kiu portas la fezon kaj posedas la vendejon apud la preĝejo. Sed Salko al li ne pruntedonos sian Arap.

— Li estas prava. Tiuj dum la ringludo terure elturmentas la ĉevalojn. Kaj la nigrulo estas ankoraŭ eĉ obstina, kaj —

— Ne pro tio, sed Salko ankaŭ volas ĉi tiun jaron partopreni la ringludon. Kaj vi vidos, nek estos tia ĉevalo nek tia ringludano.

Nun ili direktis siajn rigardojn laŭlonge de la varmigita kampo, kvazaŭ ili vidas antaŭ si preterpasadi brilantan vicon de la ringludanoj sur viglegaj ĉevaloj, kaj kvazaŭ tiuj ringludanoj estas broditaj per nuraj radioj de la somera suno.

— Kio? — diris fine Gare — kaj de kie al Salko la vesto de la ringludano? Ĉi tiun jaron ja kurados verŝajne ĉirkaŭ tridek, ĉar estos tia ringludo, kia ĝi ne estis, de kiam ĝi estiĝis: ĉiu tenos sian veston.

— Eh, por la vesto al li estas facile. Aŭ Raŝica ne posedas da hajduka mono! Aŭ vi ne scias? Raŝica ja delonge mendis ĉion necesan, eĉ la dolmanon kaj kamizolon . . . ĉio per seka oro brodita, ke malmultaj estos pli belaj. Kaj la selon kaj bridojn li posedas de la bejo, vi ja vidis ilin, — mi pensas, ke ne povas esti pli bona vesto por la ĉevalo. Arap nigra, kaj sur ĝi la nura arĝento! Nur la veston Raŝica ne mendis por Salko.

— Nu! Kio ĉi tio estas ree! Li ne mendis por Salko! Ĉu li mem bezonas la veston de ringludano?

— Raŝica ĝin mendis al si!

Gare tute ne multe ekmiris. Li sciis, ke Raŝica estas malnova hajdukestro, forta kiel iu reĝo kaj famekonata kuraĝulo. Kaj riĉa, kaj li volas, ke pri li oni parolu eĉ pli.

— Tiam adiaŭ, Salko, la ringludo! — ekkriis Gare kaj sidiĝis. — Kion Raŝica enigas en sian kapon, tion neniu el li eligos. Kaj kion vi sekve parolas, ke Salko — —

— Sed Salko diras, ke li lin tiom petos kaj petos, ĝis li permesos, ke li vetkuru, kaj donos al li la veston; kaj ambaŭ estas samformaj — — aŭ vi ne scias? . . . Vi ja ne estis hieraŭ ĉe Matasovo arbetaĵo, — Salko tion rakontis. . . Kaj ekpensu: Salko estas dekokjara, kaj Raŝica jen kvindekjara! . . .

— Kaj, li ne volas lasi?

— Ne!

Ambaŭ enpensiĝis kaj eksilentis.

Salko-n plu oni ne vidis: verŝajne li jam delonge eniris inter la salikojn kaj herbojn apud Cetina. Kaj la suno egale senĉese brulis kaj la trankvilo ŝajnis pli granda ol antaŭe.

— — — — — — — — — — — — — — — —

La brila kaj vasta kampo malheliĝis kaj reviviĝis.

Okcidentaj montoj komencis etendi siajn ombrojn trans la vasta kampo kaj ekaŭdiĝis la voĉoj de l' ĉevalistoj kaj paŝtistinoj. Kelkloke jen la bovobleko, jen ĉevalbleko kaj galopfrapado, nun ĉio tio intermiksita kun kantoj pri amo kaj heroeco.

Dum la sunsubiro la tero komencis profunde spiri kaj venteto de la oriento komencis ventumi la bruligitan regionon. Kaj la regiono, kvazaŭ ekkaresita junulino, ekruĝiĝis pro la nebuleto kaj sunradioj de la okcidento. Kvazaŭ per sango malsekigita, la tero ŝajnis, esti ekĝermiginta ruĝajn florojn.

La grandega kampo senĉese strange resonegis, kiam ĝin frapis la hufo de ĉevalo, kvazaŭ ĝi ĝemas lacigita pro tiom da rajdantoj turkaj kaj cetinaaj.

Kaj ĝi rebruis pro tio, ĉar iam tiu kampo estis granda lago, sed nun ĝin prikreskis la ŝelo el tero kaj herbo. Kaj ankaŭ nun ondumas sub ĝi la senfunda akvo kaj pro tio ĝi rebruas sub la hufoj de bonaj ĉevaloj. Kaj cetinaaj fraŭloj ne timas ĉi tiun rebruon, sed al ili aperas grandaj taĉmentoj da rajdantoj kun silkaj standardoj kaj tamburoj, dum ili, fermante la okulojn, ekkantas pri taĉmentoj, kiuj iam trairadis ĉi tie.

Sed ankaŭ la paŝtistinoj en siaj kantoj minacas al tiuj, kiuj intencas ilin forrabi, kaj iliaj kantoj temas pli multe pri heroeco kaj armilaro, ol pri fraŭloj kaj amo. Kaj aŭdante tiun resonegon kaj tiujn kantojn, vi dirus, ke leviĝas la tuta regiono kaj rapidegas al batalo ien malproksimen, por tiun saman nokton atingi malamikaron, kiu forkuris kun rabaĵo. —

Tiam Juriŝa kaj Gare sin levis kaj ekrajdis, serĉante per la okuloj en la malproksimo la plej karajn paŝtistinojn.

Sed la paŝtistinoj jam sciis, kie estos iliaj plej karaj fraŭloj, kaj ili tien pelis sian brutaron.

Kaj tiel vidiĝis sur kampaj vojoj aroj da ĉevaloj kaj bovoj, solaj irantaj, kaj amasoj da gefraŭloj brako je brako aŭ ĉirkaŭprenitaj, kaj malpliaĝaj ilin rajdante sekvis. Iuj fraŭloj vetrajdis trans la kampo, sed al ili ĉiuj paŝtistinoj estis egale karaj.

Kaj ju pli kaj pli profunde la suno subiris, des pli kaj pli la herbejoj senhomiĝis, kaj sur la kampaj vojoj sub la vilaĝoj leviĝis la polvo de multaj piedoj.

Sur la kruciĝoj ili haltetis iomete por ankoraŭ ŝerci, kaj tiam ili disiradis kaj vokadis unu la alian tra la rido kaj kanto. Ĉiuj estas fraŭlinoj kaj fraŭloj, pliaĝaj kaj infanoj nur kelkaj. Sed en la vilaĝoj, kiuj ĉiuj estas etaj, vidiĝis amasoj da geinfanoj, kiujn ne estis facile diferencigi unu de la alia.

Ĉiu el ili estis blankhara kaj vestita per longa blanka ĉemizo, zonita per ruĝa zono. Ordinare ilin oni vidis inter la montetoj po kvin, po ses, kun longa vergo en la mano kaj nudkapaj, irantaj senlaboraj aŭ post ia brutaro. Kaj eĉ sur la pintoj de l' montetaj oni povis ilin vidi blankaj kaj altaj sin montrantaj je la horizonto kiel statuoj el gipso. Antaŭvespere ankaŭ inter ili okazadis alvokoj kaj longaj revokoj kaj sonanta kanto de junaj gorĝoj, kiuj tremetis dum la kurado sur krutaj deklivoj.

Poste tiuj voĉoj intermiksiĝadis kun la krio kaj kanto de la fratoj kaj fratinoj, kun la bruo de l' ĉevaloj kaj bovoj, kiuj el la kampo revenadis, — ĉiuj en unu kirlo ĉirkaŭ blankaj dometoj, inter sovaĝaj nuksarboj kaj sambuko.

Dum tiaj someraj vesperoj malsupre sub la vilaĝo Begluk disiradis Salko kun Marta, antaŭ ŝia domo. Kaj kunvenoj kaj disiroj iliaj estis antaŭe tie oftaj, ke ili ŝajnis ĉiufoje egalaj.

Ili sin tenadis ĉe la manoj, rigardante unu al la alia en la okulojn, kaj rerigardadis foje por vidi, ĉu eble estas iu proksime. Kaj tiam ili sin kisadis kelkfoje kaj tiam Salko foriradis rerigardante Marta-n ĉiam, ĝis li flankeniris en la straton, inter murojn. Sed Marta longe rigardis antaŭ si, kvazaŭ ŝi sorĉas la estonton. Kaj ĝuste pro tio, ĉar ili ŝin ofte vidis enpensiĝinta, parolis la vilaĝanoj, ke ŝi estos sorĉistino same kiel ŝia patrino. Aliajn fraŭlinojn ili neniam vidis enpensiĝintaj.

Ankaŭ tiun vesperon ŝi staris antaŭ la domo longe kaj ne levis la okulojn, ĉar ŝi miris pri siaj pensoj. Ĉiam ŝi pro io timis, ke eble venos Salko, de kiu ŝi jam la dekan tagon zorge sin kaŝas.

Estis bela fraŭlino tiu Marta. Bela ŝia kapo, volvita per la nigra hararo, kaj la vizaĝo malhele-ruĝeta kun nigretaj okulharoj kaj lipoj ruĝaj, kvazaŭ skarlato. Grandaj malhelaj okuloj el la profundo brilis strange, ke al vi la membroj senfortiĝus pro ŝia rigardo. Staturo ŝia sanega, oni dirus fandita, kaj la brusto suriĝis kaj levis delikatan ĉemizon, kvazaŭ ĝi estas plej delikata vualo. Rigardante ŝin, vi sentus sekretigitan forton, kiu estas en ŝi, kaj vi dezirus komenci batalon kun tiu forto, kiu flamas nur pro tio, por ekbatali kaj poste esti venkita. Sed esti venkita de tiu forto, kiu estas multe pli forta ol ŝi.

Kvankam ŝi estis malriĉa, tamen ŝi sin vestadis sufiĉe bele: neniom pli malbele ol pli riĉaj fraŭlinoj. Malmulta ornamo estis sur ŝi, sed ĉio pura kaj plaĉa, kaj konvenis ĉirkaŭ ŝia bela korpo, kaj ŝajnis, ke ŝia vesto estas plaĉa kaj bela tial, ĉar ĝi estas sur ŝi. Kaj ne estas fraŭlo, kiu ŝin ne ekdezirus, se li ŝin vidus tiel sana kaj prilumigita de la vespera lumo, en kiu ŝi ŝajnis ankoraŭ pli bela.

Sed ŝian patrinon timis la patrinoj de la fraŭloj kaj pensis, ke ili ne timas sen kaŭzo.

Ankoraŭ ĉi tie staris Marta enpensiĝinta, kun mallevitaj longaj okulharoj, ĝis ŝin vekis la voĉo de ŝia patrino.

La maljunulino portis iom da ligno, kaj apud ŝi paŝis ankaŭ Raŝica, la patro de Salko.

Sed ju pli ektintis arĝentplatoj sur Raŝica Crnoŝija kaj kiam ŝi aŭdis lian fortan voĉon, kiu nur ordonas, des pli Marta mortpaliĝis, kaj ekruĝiĝis kvazaŭ ruĝa floro.

Kaj tiun fojon pli ol antaŭe, ĉar ŝi aŭdis, ke Raŝica kun ŝia patrino parolas pri ŝi. Sed li nur ekpetis, ke ŝi portu al li iom da malvarma akvo, akre ŝin ekrigardis kaj foriris kun hajduka paŝo, ke la tero rebruis kaj tintetis arĝentplatoj.

Tiun vesperon Marta ne demandis, kion Raŝica parolis pri ŝi, ĉar ŝi timis pri tiu hajdukestro eĉ pensi, kaj ne pro tio, ke ŝi eble timis antaŭ sia familio. Patrino ŝia ja ne estis sorĉistino kiel oni rakontis, sed nur maljuna kaj malbela virino, kaj la patro delonge estis malsana kaj eĉ ne aŭskultis, kion oni parolis antaŭ li. Kaj malgranda Iva, ŝia malpli aĝa fratino, estis ankoraŭ infano, kaj aliaj personoj cetere ne estis en ilia domo. Sed ankaŭ la patrino menciis nenion, sed vidiĝis antaŭ la domo kaj fikse ekrigardis en la malproksiman kampon, kiu fariĝis pli kaj pli malluma.

La bruo sur la montetoj estis pli kaj pli malmulta, kaj nun aŭdiĝis nur solaj voĉoj, kiuj malproksime aperadis kaj perdiĝis rapide.

Sed iom poste, kiam la tutan regionon premis la varma kaj trankvila somera nokto, nenio plu aŭdiĝis krom la muĝo de Cetina kaj krio de strigo.

Kaj en la regiono estas tiel trankvilaj noktoj jam cent kaj sesdek jarojn: same en la dormema somera lunlumo, kiel kiam premas la peza neĝo en malvarmega nokto vintra.

## II.

Stranga kaj maltrankvila estis la vivo de tiu Raŝica Crnoŝija, la patro de Salko. Li estis dorlotita kiel solulo de riĉaj gepatroj, sed ne malhardiĝis, ĉar pri tiaj oni eĉ ne aŭdis en Cetina. Li nur alkutimiĝis, ke lin oni tro laŭdu kaj ke oni faru ĉion, kion li deziras.

Kiel neniu similis lin rilate belecon kaj fortecon, tiel ankaŭ ne rilate riĉecon kaj forton, kaj kiam li estis matura por edziĝo, li povis elekti fraŭlinon en tuta Cetina. Sed Raŝica volis neniun alian, sed nur Stana-n, kaj ŝi poste fariĝis la patrino de Marta, kiun nun oni nomas „maljuna sorĉistino".

Sed en tiu tempo ŝi estis same bela kiel nun Marta. Eble ŝi estis eĉ ankoraŭ pli bela, ĉar Raŝica kun siaj gepatroj tre disputis, ĉar ili volis, ke li edzinigu alian, riĉan fraŭlinon. Sed ili konis sian Raŝica kaj fine al li diris: „Edziĝu kun ŝi, filo, kun beno! Kvankam ŝi estas malriĉa, ŝi estas la plej bela el ĉiuj fraŭlinoj, kiujn ni konas. Kaj ni tute ne bezonas la trezoron de Luca, ĉar ni ja mem posedas sufiĉe." Tiel ili diris, ĉar ĉiam ili volis, ke ilia Raŝica estu kontenta tute.

Kaj li ja tiam tre ĝojis! Oni diris, ke li, dum li iras, eĉ ne tuŝas per la piedoj la teron pro granda ĝojo.

Tio okazis en somero, kaj ili intencis geedziĝi en la aŭtuno.

Sed tiun someron falis la vipo sur tutan Cetina: komencis mortigi nigraj varioloj, kaj la sonoriloj tintis tutajn tagojn. Kaj ne estis domo, el kiu oni ne elportis mortinton, kaj ankoraŭ nun oni mencias tiun teruran jaron, la plej nigran el turkaj tempoj.

Kaj tiu dia vipo vizitis ankaŭ belan Stana-n. Sufiĉe ŝi suferis, sed je sia malfeliĉo restis viva. Ĉar kiam ŝi

resaniĝis kaj vidis sin en spegulo, ŝi tuj diris al Raŝica: „Mi ne povas esti via."

Kaj vere ŝi post la malsano fariĝis tia, ke eĉ ŝia patrino ne povis ŝin rekoni. Ŝi estis vere malbelulino, nur la okuloj restis belaj. Sed ankaŭ tiuj belaj okuloj fariĝis poste malbelaj, kaj nur pro nigraj pensoj.

Sed Raŝica tiom amis Stana-n, ke li volis ŝin edzinigi eĉ tiam. Sed ŝi neniel volis kaj tiel li ŝin fine lasis en trankvilo.

Malĝojis kaj malĝojis unu pri la alia, kaj tiam Raŝica edziĝis kun Luca, kaj Stana edziniĝis kun malriĉa Ilija. Sed nek unu nek la alia sentis ĝojon en la koro, kvankam ili estis ankoraŭ tre junaj. Neniu de ili estis dudekjara, kiam la malĝojo alkondukis la morton antaŭ iliajn okulojn.

De tiam atakis Stana-n ĉiaj ĉagrenoj kaj ne estis tago, ke al ŝi io ne okazis. Unue ŝin oni proklamis kiel fantomon, kaj kiam ŝi edziniĝis, eĉ kiel sorĉistinon, — kaj se iu subite malsaniĝis aŭ ies bovino ĉesis doni lakton, pri ĉio ŝi estis kulpa. Kaj se io perdiĝis, ili venis al ŝia pordo, por demandi pri tiu objekto.

Stana klinis sian kapon antaŭ tiuj malfeliĉoj kaj estis al sia edzo bona edzino, sed al Raŝica Luca estis des pli malkara, ju pli longe li vivis kun ŝi. Ŝi ja naskis al li filon Salko, sed li fariĝis pli kaj pli malserena kaj ekscitema.

Kaj kiam mortis liaj gepatroj kaj kiam plioftiĝis la pafoj sur la turka limo, li foriĝis de sia domo kaj fariĝis hajdukestro. Tiel li fariĝis timigilo al la Turkoj, kaj ankaŭ al la aliaj, kiuj komercis kun ili.

Tiam fariĝis ankaŭ tiuj kantoj pri Raŝica hajdukestro, granda heroo, pro kiu ploras turkaj sinjorinoj.

Kiam li aŭdis, ke mortis lia edzino, revenis Raŝica

al sia hejmo por ne foriri plu, sed li pli ofte tamen ekiradis kiel ekzemple tiam, kiam li alkondukis la nigrulon de la bejo.

Pasis tri jaroj, post kiuj li restis trankvila hejme; Salko tiam estis dekkvinjara, kaj Raŝica kvardeksepjara. Kaj li alportis tiam tiom da mono arĝenta kaj ora kaj da aliaj aĵoj, ke Cetinaanoj en la disputo diris: „Mi ne volas, ke vi al mi eĉ donu la trezoron de Raŝica!“

Kaj al Raŝica diris neniu ion, kontraŭe lin eĉ estimis ne nur la vilaĝanoj, sed ankaŭ tiuj en la urbo. Tiaj tempoj estis tiam.

Ili ankoraŭ lin elektis kiel estron de vilaĝo Begluk, sed al Raŝica Crnoŝija ŝajnis, ke eĉ ne povas alie esti, kaj ĉiam li restis ekscitema kaj malafabla.

Sed dum ĉi tiu lasta tempo li kvazaŭ iom ŝanĝiĝis. Li ne estis plu tiel malserena, sed multe pli ĝoja, kaj li kvazaŭ ekridetis foje kaj ĵus tiam, kiam ne estis pri io ridi. Viraĝo lia aliformiĝis kaj fariĝis multe pli juna, kaj la mortigaj okuloj komencis brili per milda brulo kiel ankaŭ ĉe lia filo Salko. Kaj li ne kantis plu hajdukajn, sed mallaŭte nurajn knabinajn kantojn, kaj la vilaĝanoj diris: „Jen li fariĝis estro, havas la filon, sanan fraŭlon, kaj plenan domon de ĉio, kaj kial, ke li ne ĝoju? Tial eĉ foriĝis liaj hajdukaj pensoj.“

Sed Raŝica ne ĝojis, kiel ili pensis.

Kiam li el la hajdukeco revenis, li foriĝis de ĉiu kaj apenaŭ resalutis, kiam lin oni salutis. Li nur konstruadis kaj konstruadis sian novan kastelon triangulan sub Orlov-aj rokoj kun granda korto kaj truoj por pafiloj, kvazaŭ ian bastionon. Kaj li estis nur kun Salko, kvazaŭ li dezirus anstataŭigi la tutan tempon, dum kiu ili ne estis kune. Sed kiam Salko ion al li parolis, li turnis sian kapon, kvazaŭ li ne aŭdis. Tiel okazis

kun ĉiu, ĉar li pensis, ke neniu estas kio estas li, kaj kun lia filo pro tio, ĉar al li ŝajnis, ke li estas ankoraŭ vera infano.

Do, ankaŭ la vilaĝanoj foriĝis de li.

— Li ja estis mortiginta homojn, kvankam ja nur Turkojn, kaj ankoraŭ li ne estis konfesinta, kion ĉion li faris. Kaj eble li estis mortiginta eĉ iun nian fraton kristanan. Tiel ili pensis, kaj kiel estron lin ili elektis, ĉar ili sciis, ke lin ĉiuj obeos, ĉar li spertas ordoni.

Sed venis ankaŭ la aŭtuno, la dua post kiam li revenis el la hajdukeco, kaj kun ĝi ankaŭ la malhelaj pluvaj tagoj.

La kastelon li finis, sed ĝi estis tiel senviva kaj trankvila, ke li, sidante en ĝi ŝajnis disponita por plori. Kaj se li eliris, estis same tiel malĝoje, ĉar eĉ la kampo kaj tuta regiono estis privolvita de malvarmega nebulo kaj alpremita de eta pluvo, kaj ĉar li havis laboron nek en la kastelo nek ekster ĝi. Kaj eĉ iu sono ne aŭdiĝis, kaj Salko estis ie en la vilaĝo kaj kantis, eble, kun junulinoj ĉe ĝoja fajreto.

Kaj al Raŝica ŝajnis, ke li estas sola, tute sola en la tuta mondo. Li sciis ankaŭ tion, ke lin neniu amas, kvankam ili lin timas, kaj eĉ mem Salko.

Kaj kiam li paŝis unu tian vesperon en la senhoma kastelo, eniris lian menson la longa kaj vasta vintro, kiu venos, kaj Kristnasko, kiu estos neniom pli ĝoja ol tiu malĝoja aŭtuna tago.

Kaj nombrante la tagojn ĝis Kristnasko li haltis ĉe la tago de l' mortintoj, kaj liaj malserenaj pensoj fariĝis ankoraŭ pli malĝojaj: li rememoris sian mortintan edzinon Luca kaj ĉion, kion li pekis.

Li rememoris dum tiu tago sian foriron al la hajdukoj, kiam ŝi lin ĉirkaŭprenis, por ke li restu, kaj kiel li ŝin forŝovis, — kaj tiun timigitan kaj mildan rigardon, kiu

rigardis post li dum la foriro. Kaj tiam ĉiujn tiujn noktojn, kiam li revenadis hejmen kaj dum kiuj li kun sia edzino nenion parolis, sed nur mallaŭte rakontis pri forrabita trezoro, kiun li amasigis en la roko. . . Kiam Salko tremis pro timo kaj rigardis lin timigite, li prenis lin antaŭ sin, sed ne kisadis lin, nur por ke Luca eĉ ne ekĝoju. Kaj li rememoris tiun amindan kaj humilan rigardon ŝian, kiun li nevole rimarkis, — kaj kiel ŝi al li, pro timo, rapide mallevis siajn grandajn, sed bluajn kaj akvecajn okulojn.

Nun al li ŝajnis, ke tiuj okuloj tute ne estis tiel malbelaj, kaj ke li oferus ĉion, kion li posedas, nur por ankoraŭfoje ilin vidi. Kaj plej multe tial, por ke li sin pravigu antaŭ ŝi pro ĉio tio, kion li al ŝi faris.

Li volis almenaŭ ĉirkaŭpreni Salko-n, kiu sola restis post ŝi, sed eĉ Salko ne estis tie.

Li rememoris ankaŭ tion, ke ŝi mortis sola kaj neprizorgita, kaj ke ŝi eĉ dum mortmomentoj pensis nur pri li. Ŝi ja restigis ĉiujn siajn kampojn, herbejojn kaj alion, kion ŝi posedis, ĝuste al li, kaj ne al la filo. Kaj li bone sciis, kiom ŝi amis Salko-n: ŝi lin amis kiel vidvino solan infanon, kiu al ŝi restis post kara edzo.

Kaj pro tiaj pensoj stranga kaj peza malĝojo kovris tutan lian animon, kaj Raŝica ekhontis kaj pentis, kion li ne faris de sia infanaĝo.

Tiam li ekpensis pri ĉiuj tiuj, kiujn li mortigis kiel hajduko en la intermontaĵoj ĉirkaŭ ŝtona Prolog.

Li rememoris, kiel ili tra valo ĝoje kantis pri la heroeco aŭ amo, rapidante al la siaj, kiuj ilin dezirplene atendas.

Kaj precipe klare li rememoris unu vintran nokton, dum kiu dense neĝis, kaj estis tiel trankvile, ke la vortoj de l' kanto bone aŭdiĝis, kvazaŭ vojaĝanto estas nur unu pafon malproksime.

Iu heroo interparolis kun sia ĉevalo:

Kial ci nun en la monto timas?
Ĉu ci timas lupon aŭ hajdukon?
Lupo lupon en mont' ne atakos,
Flugil' mia! hajduko hajdukon.
Societo nia estas lupoj,
Korvoj nia interparoleto!

Ĵus kvazaŭ li nun aŭskultas tiun kanton, tiel bone li rememoris tiun vintran nokton.

Kaj li rememoris, kiel li pretigis sian pafilon, kaj kiel baldaŭ ĉe la kurbiĝo, inter densaj neĝeroj aperis juna turko, bela kaj belstatura, ĝuste tia kiel lia Salko.

Jes, li estis ĝuste kiel Salko!

Li aŭdis en tiu momento eĉ duafoje lian fortan ekkrion, same kiel tiam, kiam li lin per la kuglo trafis. Kaj al li ŝajnis, ke li vidas lin prenanta la pistolon, sed tuj lia mano senfortiĝis kaj li falis en la neĝon kvazaŭ subhakita pino.

Kaj tiel viciĝis al li okazintaĵo post okazintaĵo, sed ĉiuj estis malĝojaj kaj sangaj, kaj inter ili eĉ ne unu, kie Raŝica estis milda aŭ faris al iu bonon.

Samtempe li pensis, ke pri tio estas kulpa nur lia malbona sorto, kiu lin akompanis de lia naskiĝo. Tamen li decidis, ekiri al la pento post tiom da jaroj kaj tiel plifaciligi sian animon. Kaj ĵus en la tago de la mortintoj, kiam li pagos ankaŭ la preĝojn por sia mortinta Luca, al kiu li plej kulpiĝis.

Sed la tago de l' mortintoj tiun aŭtunon estis nek malserena nek malĝoja, kiel la tagoj antaŭ ĝi.

La suno jam de l' frumateno ĝoje brilis, kaj la montetoj ĉirkaŭ la kampo multkoloriĝis de malhele-verda, flava kaj ruĝeta foliaro de la fruktejoj kaj vinberejoj. Virinoj kaj junulinoj iris al la preĝejo kun branĉetoj de la pinoj kaj

vaksokandeloj, kaj al li inter ili ŝajnis, ke ĝi estas tago de gloro, saneco kaj ĝojo, kaj ne malgaja rememorigo al la mortintoj.

Li faris la penton kaj komuniiĝis, sen armilaro kaj arĝentplatoj sur si, kaj sin sentis refreŝigita kaj plijunigita, sen kulpo kaj sen nigraj pensoj, kiuj lin tiom turmentis dum tiuj tagoj.

Sed tamen li volis fari ĉion, kion li decidis, kaj foriris kun Salko al la tombo de sia edzino, por ke ankaŭ ili alkroĉu branĉeton de la pino kaj preĝu.

Tiom da homoj estis ĉirkaŭ ili, ke li eĉ tion ne povis preĝi, kion li sciis, sed li komencis rigardi multkolorajn amasojn da virinoj kaj junulinoj, kiuj sin premis ĉirkaŭ la tomboj.

Aŭdiĝis la ploro kaj vekriado, sed la suno tiel ĝoje brilis kaj fianĉinoj kun fraŭlinoj, kun verdaj branĉetoj kaj junaj vizaĝoj, paŝis trankvile trans kvietaj tomboj. Pro tio ankaŭ lia penso estis tre malproksime de la mortado kaj morto.

Kaj kial, ke mi mortu? — li pensis — kaj kial, ke mi suferu pro tiuj, kiuj mortis? Por tio, kion mi pekis, mi pentis kaj nun mi estas ĉasta kaj bona kvazaŭ infano. Mi suferis multe, sed plu mi ne volas suferi. Mi ankoraŭ vivos kaj ĝojos pri la suno kaj saneco, kaj jen ankaŭ Salko ĉe mi. . .

Tiam denove lin okupis malĝojaj pensoj, ĉar li ne povis scii, kia estos lia estonta vivo, kvankam li estos sana kaj la suno brilos kiel dum tiu tago. Kaj tiu ŝanĝiĝo fariĝis en li, kiam li komparis sian estontan vivon kun la vivo de Salko.

Salko amos junulinojn, li ankaŭ ĉirkaŭprenados junulinojn, kaj edziĝos kun tiu, kiu al li estos plej kara. Ne estas ja eble, ke lia filo estos malfeliĉa ĝuste en kio li

estis. Kaj pro tiuj pensoj li ree malĝoje mallevis sian kapon.

Sed kiam li ĝin levis, li ekvidis kelkajn paŝojn antaŭ si, apud iu malnova tombo, knabinon, kaj ŝi estis Marta, filino de Stana.

Ŝi ĝoje parolis kun sia kunulino kaj karesis ŝian vizaĝon per pina branĉeto.

Marta tiam estis deksesjara, sed ŝajnis plenkreskinta junulino, preta por amo kaj karesado.

Kiam Raŝica ŝin ekvidis, ekhaltis en li la sango kaj nebuliĝis antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ lin ĉirkaŭpremas la morto. Sed tuj post tio komencis la sango pli rapide flui tra liaj vejnoj: li ekruĝiĝis kaj liaj okuloj ekbrilis. Kaj li staris tiel tremetante per la okuloj, kvazaŭ li el la mallumo estas elirinta en la varmegan sunlumon aŭ, kvazaŭ li ne estas kredanta je tio, kion li vidas.

Li devis eĉ miri pri Marta, sed ne nur pri ŝia beleco, sed ankaŭ pri tio, ĉar ŝi tute similis al patrino sia, — lia de la sorto nepermesita Stana.

La bildo de l' junulina vizaĝo de Stana estis malheliĝinta en lia animo, ĉar lastatempe li vidadis ŝin tiel malbeligita kaj maljunigita pro la malĝojo kaj malriĉeco. Sed nun, kiam li vidis ŝian Marta-n, ĉiuj tiuj malfeliĉoj kvazaŭ eĉ ne estis kaj li kvazaŭ revenis en sian dudekan jaron. Ĉiuj sekretigitaj ĝojoj, deziroj kaj esperoj, ekkirlumis en lia animo.

Sed kiam li ekvidis Salko-n kaj Marta-n ekridetantaj unu al la alia kvazaŭ malnovaj konatuloj, li iom enpensiĝis. Tiam li levis obstine sian heroan kapon kaj foriris trans la tombejo, nek iun rigardante nek invitante Salko-n.

Kaj de tiu tago amis Raŝica Marta-n tutkore, kaj same tiel, kiel antaŭ tiom da jaroj ŝian patrinon. Kaj nun li estis en plej bona forteco, kuraĝula kaj bela, kaj al neniu

estus strange, se li vidus lin en la rondodanco kun aliaj fraŭloj.

Foje, komence, Raŝica volis forgesi tiujn siajn amojn, la novan kaj malnovan, kaj precipe, kiam li rigardis Salko-n. Sed tio al li estis malebla, ĉar lia koro estis ankoraŭ tre juna kaj Marta estis tre simila al sia patrino. Kaj patrinon ŝian li amis tutkore tiam, kiam ŝi estis same tia, kia nun estas ŝia filino.

Sed neniu sciis pri tiu amo, kaj neniu povis eĉ supozi, kio estas en lia koro. Kaj li mem, dum tutaj tiuj du unuaj jaroj, diris eĉ ne unu vorton al Marta. Li nur kelkfoje ŝin ekrigardis strange kaj akre en la okulojn kvazaŭ demandante: Ĉu ja estas eble, ke vi min ne komprenas? Aŭ ĉu estas eble, ke vi ne scias, kiel mi vin amas, kvankam mi silentas?

Kaj li divenis: ŝi, kiu estas tre amata, devas tion rimarki, kvankam vi ŝin evitas.

Kaj Marta vere supozis lian amon, sed ne riskis eĉ ekhalti ĉe tiu penso: ŝi pensis, ke ŝi amas Salko-n, ĉar li estas juna kaj bela same kiel ŝi, kaj ne estas eble, ke ili sin ne amu.

Sed rigardante en la okulojn de Salko, al ŝi ŝajnis, ke ili petas la amon, kiu apenaŭ venos, kaj rigardante en la okulojn de la hajduko Rasiĉa, ŝi sentis, ke li al ŝi ordonas kaj revivigas iun amon, kiu ekzistis jam delonge.

La kisoj de Salko fariĝis al ŝi pli kaj pli ordinaraj, kaj li ankoraŭ eĉ nun petas tiujn kisojn kaj cedetas antaŭ ŝi, kiam ŝi koleretas, kvankam eĉ ŝerce. Kaj ŝi atendis ian alian amon, kiu ne permesos al ŝi eĉ spiri.

Raŝica ĉi tiun someron sciis, ke Salko kun Marta ofte kunvenas, kaj supozis, ke ili ŝercas kaj ridas unu kun la alia. Sed li sciis ankaŭ tion, ke tiel faras ĉiuj paŝtistoj kaj paŝtistinoj, de kiam oni scias, kaj tiel faris ankaŭ li,

kiam li estis ĉevalisto. Sed ke Salko jam nun volas edziĝi, li ne pensis, kaj ankoraŭ pli malmulte, ke li volas Marta-n kiel edzinon.

Li sciis, ke neniu fraŭlo petis la manon de Marta-n, kaj certe plu ankaŭ ne petos, ĉar ŝi estas pli aĝa kaj nun ŝi estas dudekjara. Ili ne faris tion, ĉar ŝi estas malriĉa, kaj patrino ŝia estas sorĉistino, per kiu oni timigas ĉiujn infanojn en Cetina. Pro tio ŝin eĉ la plej malriĉaj ne volas, kaj precipe certe Salko ne volos la filinon de Stana alkonduki en la kastelon triangulan.

Kaj pri ĉio ĉi li ĝojis. Li ĉion kvazaŭ ordigis, por ke estu ĝuste tiel, kiel estas plej bone por li.

Se oni al li mokos, li tion ne prizorgetos. Sufiĉe estos, ke Marta estu lia, kaj kion la aliaj parolos, pri tio li ĝis nun ne zorgis. Li sciis, ke la gepatroj de Marta ekploros pro ĝojo, kiam li ŝin postulos, sed ŝi? Li ja ne pensis ke ŝi lin amas, sed li esperis, ke ŝi volonte edziniĝos kun li.

Tial li klopodis por kelkfoje kunveni kun Marta, por ekscii, kion ŝi pensas. Precipe tiun someron li serĉis solecajn kunvenojn kun ŝi, kaj ŝi tute ne evitis tiujn kunvenojn.

Kaj ĵus tiam, kiam Salko vane atendadis Marta-n apud Cetina, ili interparolis en iu ombrita strato sub Begluk. Sed tiel estis nur dum tiuj lastaj tagoj, antaŭ la ringludo, fine de la monato Julio. Kaj eĉ tiam ili ne parolis pri la amo, sed pri kio ajn, kaj nur rigardis unu la alian.

Kaj Marta de tiu tempo komencis eviti Salko-n, kiam ajn ŝi povis.

Tiel ankaŭ tiun tagon, kiam li forrajdis de Gare kaj Juriŝa, li ne trovis ŝin apud la kurbiĝo de l' rivero, kie ili antaŭe kunvenadis ĉiun tagon.

Marta siajn du bovojn komencis sendi al paŝtado kun

malgranda Iva, fratino sia, kaj ŝi restis hejme. Kaj kiam Salko, pensante, ke ŝi estas malsana, venis al ŝi en la domon, ŝi sidis apud la malsana patro kaj tiel li povis nenion al ŝi diri.

Salko estis malĝoja, ke ili ne povas kunveni solaj, sed al li ŝajnis, ke li scias, kio estas al Marta.

Li pensis, ke ŝi lin evitas, ĉar ŝi ne kredas al li kaj pensas, ke li ne volas kun ŝi edziĝi. Tial li eĉ mallaŭdis sin mem, ke li tion al ŝi neniam menciis, kaj li decidis, tion al ŝi diri, kiam li estos kun ŝi sole; same tiel, ke li devas tuj paroli kun sia patro pro Marta, sed ankaŭ pro la ringludo.

Kaj pli kaj pli ondumis en iliaj animoj, ĝuste kiel matura spikaro, kiam vespera vento plifortiĝas super la vasta kampo. Raŝica kaj Salko kaj Marta subaŭskultetis tiun ondumadon en siaj animoj kaj kvazaŭ nevole ekrigardetis la vastan horizonton, ĉu alproksimiĝas la tempesto.

Sed la regiono ŝajnis trankvila kaj dormema en varmego de la somera suno kaj eĉ nubeton oni ne vidis sur la blua kaj trankvila ĉielo. Kaj dum mallongaj someraj tagoj estis ankoraŭ pli trankvile kaj pli silente.

## III.

Estis ankoraŭ ok tagoj ĝis la ringludo.

Ok tagoj ĝis tiam, sed ankoraŭ multe pli frue la tuta regiono maltrankviliĝis. Oni nombras ĉevalojn, ringludanojn kaj iliajn junulojn (helpantojn), kaj vestojn de la junuloj kaj ringludanoj.

Kaj precipe en la mezo de Cetina-regiono, Sinj bela, ĉiuj koroj pli vigle batas, kaj la muskoloj kaj vejnoj de l' junuloj estas streĉitaj kiel iam la arbalestoj de l' kavaliroj. Sinj ja estas la lulilo kaj antikva sidejo de

la ringludo; kaj ĝis ankaŭ nelonge la ringludon partoprenis nur Sinjanoj. Sed en pli nova tempo partoprenas ankaŭ la aliaj el regiono Sinj, se ili nur estas kun kuraĝulaj koro kaj staturo, kaj ne malpurigis la honestecon: ankaŭ ja iliaj gepatroj verŝis la sangon por la libereco.

Kaj la urbo mem ŝajnis esti kavalira nesto. Malnovaj domoj viciĝis apud du bastionoj el antikvaj tempoj: unu estas pli malalte sur la kruta roko meze de la urbo kaj la alia super la urbo, ankaŭ sur krutaĵo, kun muregoj kronitaj per turoj.

Kaj de ili oni vidas grandegan kampon kun longaj vicoj de poploj kaj salikoj, kvazaŭ militistaro, kiu invitas al heroa batalo. Kaj sur malproksimaj montoj oni vidas aliajn kastelojn, egale batalemaj kaj fieraj.

Sur tiu sama kampo, en antikva tempo, en monato Aŭgusto, Sinjaj kavaliroj venkis Mehmed-paŝaon kaj semis sur tiun kampon dekunu milojn da turkaj kadavroj.

Pro tio ja, je la eterna rememoro de tiu heroeco, fariĝis la ringludo — kaj pro tio, ke tiu antikva kavalireco ne perdiĝu en Cetina-regiono servis la ringludo vere, por ke la sopiro je la gloro kaj venkoj estu ankoraŭ pli granda.

Sur la kruciĝoj kaj kampoj, sur la herbejoj, vilaĝaj vojoj kaj ĉie, oni vidas grandajn ŝtonojn, per kiuj Cetinaj junuloj vetĵetas, — kaj la signojn, ĝis kiuj ili saltis. Kaj se iu fortulo tre transĵetas alian singon, diras Cetinaanoj, ke homon oni povas enfosi en la truon, kiun elfosis la ŝtono. Kaj oni vidas el ĉio, ke al Cetinaanoj kuraĝula morto estas io plej bela en la mondo.

Sed eĉ la vetĵetado kaj saltado kaj luktado kaj ĉevalkurado trans la herbejoj, ĉio estas nenio kontraŭ la ringludo.

Tiu ringludo ekmiregis eĉ du kronitajn kapojn! Du reĝoj alvenis por vidi tiun ringludon, kaj ambaŭ donis

riĉajn donacojn al la ringludo kaj ankaŭ al la gajnintoj, kaj la bildo de tiu heroa kurado estas en la reĝa palaco.

Kaj pri ĝi oni parolas ne nur en Cetina. Ĉiun jaron ja alsvarmas centoj kaj centoj el la regionoj Imotska, Kninska kaj Vrliĉka, — kaj Petropolje'anoj kaj Primorje-anoj kaj tiuj el Bosnio riĉa kaj sinjoroj de ĉie, — kaj ili ne faras tion vane. Ĉiuj foriras kontentaj kaj ree duan jaron ili revenas, por admiri la saman belecon.

Ili ja havas ion por admiri!

Tie vi vidas la tutan brilon de l' reĝa akompanantaro, la tutan heroecon de l' antikvaj kavaliroj kaj multkolor-econ de ĉiuspecaj popolkostumoj, ke tion eĉ oni rakonti ne povas. Rigardante en la varmego de l' Aŭgusta suno la vicon de l' ringludanoj sur viglegaj ĉevaloj, vi ne vidas alion krom la diversajn kolorojn de veluro kaj silko, kaj rebrilon de oro kaj arĝento.

Kaj kiaj estas tiuj fraŭloj? iuj altaj kaj larĝaj kvazaŭ montoj, ke la tero sub ili skuiĝas, kaj la aliaj viglaj kaj moviĝemaj, ke ili eĉ tri ĉevalojn transsaltas per unu salto — sed ĉiuj muskolaj, kun brilantaj okuloj kaj hero-eca sinteno, ke vi kun ili atakus eĉ tutan militistaron.

Fraŭlo, kiu ne estas tia, ne rajtas vetkuri en la ringludo.

Sur ĉiu ringludano estas kalpako el mustela pelto kun blanka alta kalpakornamaĵo el grua plumaro, kaj sur la piedoj botoj randitaj per arĝenta kaj ora ornamaĵoj, kaj kun akraj spronoj. Akra sabro estas sur lia femuro, kaj mortiga lanco en la mano. Kaj dolmano, kalsono kaj kamizolo, ĉio el plej bona drapo, kun ora kaj arĝenta ornamaĵoj, kaj sur la brusto brilas la butonoj, ankaŭ arĝentaj kaj oraj.

Kaj „junuloj“ iliaj, ŝildportanto kaj bastonegportantoj, — kaj tiuj, kiuj kondukas Edek-on, — ĉevalon, tute per arĝento ornamitan, — ili ankaŭ estas belegaj. Surtuto

ilia estas per ruĝa drapo kaj ŝnuroj ornamita, zono kun arĝentplatoj; kalsono blua, kamizolo blanka, kaj ruĝa ĉapo sur la kapo kun tuko. De malantaŭ silka zono bojetas antikva ponardo apud du pistoloj kaj pulvujoj arĝentaj — kaj sur la ŝultro pendas mortiga longa pafilo. Tia estas la antikva kostumo de l' Cetinaanoj.

La ĉevaloj de l' ringludanoj, eĉ sub la selo belaj, estas ornamitaj per ora kaj arĝenta ornamaĵoj, kiuj tintas dum la iro, kaj strange muĝas dum la kuro. Kaj trans la selo estas transĵetitaj same tiel per oro kaj arĝento broditaj kovriloj kovrantaj la ĉevalojn ĝis la genuoj.

Kiam tiu taĉmento en vico ekiras, ne ekzistas okulo, kiu tremetus, kaj eĉ enamiĝintaj plu ne rigardas unu la alian. Junaj kaj maljunaj, virinoj kaj viroj, rigardas nur tiun brilantan vicon kaj aŭskultas la strangan muĝon de la silko, kaj la tinton de la oro kaj arĝento, kiu aŭdiĝas eĉ inter la voĉoj de l' miloj.

Tiel la vestitaj ringludanoj *(alkari)* en sovaĝa kuro, unu post unu, per maldika lanco celas en la feran ringon, kiu estas nomata „*alka*".

Tiu „*alka*" estas konstruita el du ringetoj, unu en la alia, kiuj estas kunigitaj per tri stangetoj ankaŭ feraj. Kaj tiel estas en la ringo kvar truoj, en kiujn oni celas per la lanco.

Rringludano („*alkar*"), kiu trafas en la mezan truon, kiu estas la plej malgranda, ricevas numeron tri; la supra truo, kiu estas super la mezo, egalvaloras numeron du, — dum la du ceteraj truoj, kiuj estas flanke de la mezo, egalvaloras nur numeron unu. Tiu ringo pendas de sur ŝnureto, sed tiel, ke ĝin oni povas facile deĉifi.

Kaj ne estas nur pro tio malfacile trafi la ringon, ĉar ĝi estas malgranda. Oni kuras el sufiĉa malproksimo, sed tiu kuro devas esti tia, ke la rajdanton apenaŭ oni vidu. La lanco en la mano estas sufiĉe longa kaj peza,

kaj oni devas ĝin pretigi nur kelkajn paŝojn antaŭ la ringo por trafi.

Kaj ofte la ĉevalo, kiun estas malfacile direkti, ĉar ĝi ne volas rekte kuri sed flankeniri, timas, kaj ofte eĉ la ringo mem ne staras trankvile, precipe se estas iom da vento. Tiam la tumulto, kriado, kaj miloj da okuloj fiksitaj al la ringludano kiu kuras, embarasas eĉ tiun, kiu maljuniĝis en tiu ludo.

Kaj ankoraŭ larmoj, kiuj kolektiĝas sur la okuloj dum rapida kuro, kaj atento, por ke io ne falu de la vesto aŭ ornamaĵoj de l' ĉevalo, kaj cent aliaj aferoj faras, ke la venko estas tiom malfacila, kiom ankaŭ dezirata.

Ĉiu ringludano kuras trifoje, kaj kiu el ili dum tiuj tri fojoj akiras la plej grandan nombron de numeroj, li gajnis la ringludon. Se du akiras saman numeron, ili kuras denove, ĝis unu venkas.

Ĉiu devas sin teni heroece kaj nenio rajtas fali, nek de li nek de la ĉevalo, kaj tion priatentas pro tio starigitaj juĝantoj.

Se la ringludano trafas per la lanco la ringon, kaj ĝin antaŭ si ĵetas, kaj tiam ree ĝin en flugo kaj kuro kaptas per sia lanco, la numeroj por li duobliĝas. Tiel, se li ĝin denove kaptas en la mezon, li akiras numeron ses, kaj tio estas la plej granda heroaĵo, kion oni povas fari en tiu ludo.

Kaj la gloro, kiun la gajninto akiras, estas en Cetina tiel granda, ke tiu ringludano en tiu momento ŝanĝiĝus kun neniu en la mondo.

Muzikistoj ludas forte, sennombra popolo krias kaj bruas, kvazaŭ ondoj de l' maro je rokoj. Miloj kaj miloj da okuloj estas fiksitaj sur lin, kaj li, tiel brilanta kaj bela, fiere rajdas — tra l' amaso, kiu al li pli kaj pli forte svingas kaj ĝojkrias, — al la gvidanto, por ke li per silka ŝnureto ornamu lian heroecan lancon.

Post tio li ricevas, kiel reĝan donacon, ducent florenojn orajn, kiujn li ordinare elspezas por brilega regalo, en kiu li ĉirkaŭ sia tablo kolektas ĉiujn sinjorojn de Cetina. Kaj la tuta regiono dum longa kaj longa tempo disportas lian nomon, pri alio oni eĉ ne parolas.

Ne estas do strange, ke partopreni la ringludon estas al ĉiu kuraĝa Cetinaano la plej granda feliĉo, kaj precipe, ĉar ĉiu el ili vidas en si gajnonton.

— — — — — — — — — — — — — — — —

La regiono pli kaj pli maltrankviliĝis, kaj Salko nek manĝas nek dormas jam trian tagon. Kaj kvara tago estas, ke venis al lia patro Raŝica brilanta ringludana vesto, kaj la dekkvina, ke li ne vidis Marta-n.

Dum tiuj tri tagoj li eĉ ne foriris de Paŭŝino fonto en la kampo, sed li nur meditis kaj meditis. Kaj ju pli multe li meditis, des pli kreskis kolero en li kontraŭ lia patro Raŝica.

Li jam petis lin, ke li donu al li la veston kaj lasu lin partopreni la ringludon, sed Raŝica diris: „Ne!“ Sed kiam li diris „ne“, oni bezonas plu eĉ ne demandi.

La sekvantan matenon Salko iomete trankviliĝis kaj ree foriris al sia patro.

— Bone — li diris al sia patro — partoprenu vi la ringludon! Sed tiam vi lasos al mi ion alian!

— Diru libere, — li diris al li.

— Mi edziĝos en la aŭtuno.

— Kio . . .?

— Mi edziĝos en la aŭtuno. Tion vi devas al mi lasi.

Ambaŭ longe silentis kaj spiris rapide. Kaj tiam ekdemandis Raŝica:

— Kaj kiun vi intencas?

— Marta-n de Stana. Ni jam delonge ekkaresis.

Salko vidis Raŝika-n ekbluiĝinta en la vizaĝo kaj ekrigardinta lin tiel sovaĝe, ke li cedis kelkajn paŝojn malantaŭen.

Sed Raŝica tamen sin bridis kaj demandis sian filon:

— Kaj ĉu vi tion al ŝi ankaŭ diris?

— Ne ankoraŭ.

— Ne risku paroli kun ŝi! — ekkriis Raŝica per tia voĉo, ke en Salko haltis la tuta sango.

— Kaj kial? — diris li tremete.

— Kaj ĉu ankaŭ vi estas kara al Marta? — li demandis lin.

— Mi ja diris al vi, ke ni amas unu la alian jam delonge!

Dum momento estis terura silento, kaj tiam:

— Eksteren, infanaĉo! Eksteren, junulaĉo! — tondris en la kastelo, ke eĉ la fenestroj skuiĝis, kaj vipo en la mano de Raŝica fajfis.

Kaj de tiu tago kuŝis kaj kuŝis Salko tie en la ombro de la salikoj, kaj nur foje li iomete sin levadis por ekrigardi al sia vilaĝo kaj tiam oni povis vidi sur lia vizaĝo ruĝajn kaj bluajn postsignojn de la vipo. Kaj la tuta vilaĝo komencis paroli pri li, ĉar la ĉevalistoj rakontis, ke li kuŝas kiel mortinto sub la saliko, ne respondas kaj ne volas hejmen.

— Li kuŝu, li ankaŭ sin levos! — diradis Raŝica ĉiun fojon, kiam ili al li rakontis.

Sed tamen li ne persistis kaj komencis bedaŭri sian filon.

La kvaran tagon, kiam li ne vidis Salko-n, li ekiris al la kampo al Paŭŝino fonto, sed li plilongigis la vojon kaj ekiris tra la strato, kiu profundiĝis antaŭ la domo de Marta.

Tiun tagon trans la ĉielo sulkiĝis ia blanketa nebuleto, kaj la suno ne brilis kiel antaŭe, sed tial estis pli sufokige. La aero ne moviĝis kaj ĉio alia kvazaŭ rigidiĝis, kaj eĉ mem Cetina ne muĝis kiel dum la nokto.

Raŝica paŝis enpense tra la senhoma vilaĝo, sed kelkfoje li haltis, por ekrigardi al Paŭŝino fonto, kvankam li sciis, ke li el tiu malproksimo povas nenion vidi.

Pri Salko li koleris, sed ankaŭ sentis, kiom li lin amas, kaj li deziris paroli kun li. Sed antaŭe li ĉiel deziris vidi ankaŭ Marta-n, nur se ŝi estos hejme.

Marta estis sub morusarbo ne malproksime de sia domo, kaj kiam ŝi ekvidis Raŝica-n, ŝi volis foriĝi, sed post kelkaj paŝoj ŝi haltis kaj sin apogis al la arbo. Al Raŝica ŝajnis, kvazaŭ ŝi ne povas stari sur la piedoj, kaj li rapide transsaltis la mureton por ŝin helpi. Sed li mem tuj haltis, ĉar Marta kun mallevitaj okuloj kaj terure pala staris tiel detruite, ke li ne sciis, kion fari aŭ diri.

Marta jam estis aŭdinta, kio okazis inter Salko kaj lia patro. Ŝi bedaŭris Salko-n, sed ankaŭ Raŝica-n, ĉar ŝi sciis, ke li ankaŭ estas malfeliĉa. Ŝi amis ambaŭ, sed per amo tute diversa.

Salko-n ŝi amis kvazaŭ belan knabon kaj kunulon el la infanaĝo, ankaŭ tial, ĉar ŝi sciis, ke li ŝin forte amas. Sed ŝi neniel povis ekpensi, kiel li povus esti ŝia edzo. Ŝi deziris la edzon estimi kaj timi, sed Salko timis ŝin kaj eĉ neniam riskis ŝin ĉirkaŭpreni unua.

Kiam ŝi lin rigardis tia sen la lipharoj kaj nudmentona, kun infana vizaĝo kaj mildaj okuloj, venis al ŝi la deziro, ekludi kun li kaj lin kisadi. Sed ŝi kredis, ke vera edzo devas ludi kun la edzino, kaj ne ŝi kun li.

Kaj tial, kiam ŝi rigardis la heroecan staturon de Raŝica, lian seriozan vizaĝon kun belega malhela lipharaor, grandaj okulharoj kaj akra rigardo, ŝin okupis la deziro, sin doni al li anime kaj korpe, sen volo kaj sen pensoj. Ŝi sentis, ke ŝia koro senviviĝas kaj ke mallumo vualas ŝiajn okulojn, kaj tamen al ŝi estis tiel agrable, kvazaŭ ŝin kaptas dolĉa dormo. Kaj tiel al ŝi okazis ĉiam, kiam ŝi imagis al si, ke li ŝin forte ĉirkaŭprenas.

Kaj kiam ŝi ekpensis, ke ambaŭ ŝin amas, malsereniĝis

ŝia animo en ŝi tute kaj ŝi pensis ĵus nenion, sed plej ŝatis ploregi.

Ankaŭ nun, kiam Raŝica paŝis al ŝi, ŝi ankoraŭ pli forte sin premis al la arbo kaj ekploris tiel forte, ke ŝi tute skuiĝis.

Raŝica ŝin rigardis nur kelkajn minutojn, kaj tiam li ŝin ekdemandis:

— Ĉu vi nun ploras pro Salko?

Ŝi lin ekrigardis tiel petante kaj tiel humile, ke li tute ektremis pro sia penso.

Li pensis, ke lin tiu kortuŝa rigardo petas, ke li kompatu Salko-n kaj faru laŭ lia volo. Sed ŝi tiun momenton deziris nur, ke li ŝin savu el tiuj turmentoj, ke li faru ion ajn, kaj ŝi kredis, ke li povas. Tion parolis ŝia rigardo.

Eble ŝi deziris, ke li ŝin tuj prenu kaj konduku ien ajn malproksimen kaj tiel faru finon al tiu maltrankvilego, kiu ŝin turmentas, kaj pri kiu ŝi ne sciis, kiel ĝi finiĝos. Sed tiun momenton ŝi eĉ mem ne sciis siajn verajn dezirojn.

Sed kiam Raŝica nek ion diris nek faris, komencis la malĝojo ŝin sufoki en la koro ankoraŭ pli, kaj ŝi komencis tiom singulti, ke la foliaro de l' arbo tremis en la branĉaro.

Tiam al Raŝica estis, kvazaŭ sub li malfermiĝas granda malpleneco kaj kvazaŭ por li nenio plu ekzistas. Ankoraŭfoje li ekrigardis la belegan kaj pro la larmoj malsekan vizaĝon de Marta, kaj ekskuiĝis kaj malsereniĝis, kvazaŭ li estas decidinta ion grandan.

— Adiaŭ, Marta — li diris al ŝi — neniu plu suferos pro mi. Sufiĉe estis da ĉio!

— Adiaŭ! — li diris ankoraŭfoje kaj kun akra paŝo ekiris tra la strato.

— Raŝko![1]) — ekkriis post li Marta kvazaŭ freneza kaj etendis la brakon por lin haltigi. Sed Raŝica eĉ ne rerigardis, sed foriris tra la profunda strato al la kampo.

— Raŝko! — kriis Marta plore kaj ŝiaj makzeloj ektremis.

Ŝi min bedaŭras — pensis Raĉica — sed ne estas bezone min bedaŭri: la mia finiĝis! — kaj li komencis pli rapide paŝi, kvazaŭ li forkuras de siaj nigraj pensoj. Sed ju pli li proksimiĝis al Paŭŝino fonto, des pli malrapide li paŝis kaj des pli malalten li mallevis la kapon, tiel, ke Salko eĉ ne rimarkis, kiam al li venis la patro. Li trovis la filon kuŝanta senmove kun la vizaĝo premita al la tero.

Momenton li rigardis lian maldikan korpon, blondan hararon kaj blankan nukon. Kaj kiam li ekvidis sur li ruĝan kaj bluan postsignojn de la vipo, li lin rapide kaj trankvile vokis:

— Salko!

Kaj li levis sian palan vizaĝon kun du longaj vipopostsignoj, kaj ekvidinte la patron, malsereniĝis kvazaŭ nubo kaj okuloj liaj ekbrilis obstinece kaj malame. Sed kiam li vidis, ke la lipoj de lia patro tremas kaj ke liaj okuloj estas plenaj de larmoj, li ekmiris kaj sidiĝis.

Tiam Raŝica rapide kaj interrompite diris, kvazaŭ senspiriĝante:

— Estu al vi Marta — ŝi vin amas. Edziĝu kun ŝi eĉ morgaŭ, se vi volas — mi vin ne malhelpas. Al mi ja eĉ kare estas, ke vi kun ŝi edziĝu. Ŝi estas bona fraŭlino kaj vin amas multe — vi scias!

Tion li diris kaj eksilentis kvazaŭ io en li estas krevinta

[1]) Raŝko estas mallongigita nomo de Raŝica.

kaj ree al li ŝajnis, ke ia senfina malpleneco estas sub li. Sed rapide li konsciiĝis kaj ekkriis:

— Sed mi partoprenos la ringludon — ĉu vi aŭdis? Vi al mi estos kiel „junulo“, kaj estu kontenta. . . Kaj nun iru al Marta — ŝi vin atendas! — li aldonis enpensiĝante kaj ekridetis strange.

Kaj baldaŭ ili disiris, ambaŭ kun larmaj okuloj.

Raŝica foriris tra vasta kampo en la urbon, kaj Salko al Begluk, parolante kun si mem kaj svingante per la brakoj. La ĝojo lin konfuzis tute, kaj li eĉ la ringludon forgesis.

La suno subiris en la maldikan kaj flavetan nubon okcidente, kaj la montetoj kaj vilaĝoj griziĝis. Kaj post iom ĉio reviviĝis de cent voĉoj klaraj kaj sekretigitaj: unue unu, kaj la dua, tiam ree po kvin, kaj po dek unu post la alia kaj kune, por denove aliforme malaperi, kiam venos la nokto.

Marta ankoraŭ mallaŭte ploris, kiam al ŝi alkuris Salko kaj sidigis sin sub la sama arbo.

Kiam de ŝi tiel subite foriris Raŝica, ŝi nek povis pensi pri tio, kio okazos nun, nek pri tio, kio povus okazi. Ŝi nur sciis, ke ŝi ploras pro „ili“, kiuj ŝin amis, kaj kiujn ankaŭ ŝi amis kaj ke ŝi estas preta por ili eĉ morti. Kaj ŝi sentis ankaŭ tion, ke ŝi estas la kaŭzo de ilia malfeliĉo, same kiel la kaŭzo de l’ malfeliĉo de Raŝica estis ŝia patrino, kvankam ŝi ne estis kulpa. Poste ŝi ektimis pri Salko, ke la patro al li ne faru ion, ĉar ŝi sciis, ke li estas homo ekscitema kaj ke ili estas tre disputintaj, kaj ĉio pro ŝi.

Pro tio ŝi timeme subaŭskultetis, kvazaŭ ŝi ion teruran estas aŭdonta, kaj skuiĝis, supozante iun grandan malfeliĉon. Sed ŝi neniel supozis, kion decidis Raŝica, kiam li de ŝi forkuris.

Tial ŝi tre surpriziĝis kaj ekĝojis, kiam ŝi vidis la ĝojan vizaĝon de Salko, kiu al ŝi ŝajnis pli bela kaj pli juna ol iam ajn antaŭe.

Sed kiam li venis pli proksimen, ŝi vidis ankaŭ tiujn du striojn sur la vizaĝo kaj rememoris, ke li ilin ricevis per la vipo de sia patro, kaj pro ŝi. Kaj pro tiuj strioj kaj pro ĝojo, ke ŝi vidas lin viva kaj sana, ŝi sin levis kaj ĉirkaŭprenis lin ardege, eĉ ne pripensante, kion ŝi faras. Kaj ŝi ne rememoris, ke ŝi lin ĉirkaŭprenis tiel dum la du lastaj jaroj.

Kaj Salko tiam komencis ŝin kisi sur la malsekajn okulojn kaj tuj rapide al ŝi senspiriĝante rakontis, kion al li diris lia patro.

Marta unuamomente eĉ ne komprenis, kion li al ŝi parolis, sed kiam ŝi perceptis, ke Raŝica ŝin donas al Salko, ŝi senkonsciiĝis kaj ektremis, sed la brakon ne demetis de lia kolo. Ŝi nur ankoraŭ pli profunden mallevis la palan vizaĝon sur lian bruston kaj eĉ ne unu vorton respondis.

Kaj Salko ŝin tiel forte ĉirkaŭprenadis, kiel neniam antaŭe kaj pro granda ĝojo parolis ĉiajn strangajn vortojn, ke ŝi lin pli kaj pli bedaŭris.

Ŝi rememoris iliajn kunvenojn kaj kiel Salko ĉiam infane ĝojis, kiam li ŝin vidis. Kaj sentante, ke lia brusto pro granda ĝojo spiregas kaj ke la vortoj haltas en la gorĝo, ŝi lin ankoraŭ pli multe bedaŭris kaj komencis mallaŭte plori, tiel ĉirkaŭprenita.

Tiam ankaŭ al Salko la okuloj malsekiĝis pro larmoj, kaj li komencis ŝin kvazaŭ freneze kisi sur la hararon kaj frunton kaj kolon, — kaj al Marta la buŝo sin kunpremis kiel ankaŭ la koro, kaj ŝi ne povis ekparoli.

— — — — — — — — — — — — — — — —

Kaj senĉese dum tiuj tagoj ĝis la ringludo li malmulte

de ŝi foriradis kaj ree rapide revenadis, kaj ŝi lin rigardis milde kaj malĝoje kaj eĉ ne unu el miloj da vortoj ŝi al li diris, ne dezirante lin malĝojigi. Kaj eĉ se ŝi estus volinta, ŝi eble ne estus trovinta vortojn, por eldiri tion, kion ŝi sentis.

Sed Salko estis kontenta kun ĉio tio, kion ŝi faris, kaj en granda ĝojo li ĉirkaŭprenadis ŝiajn patrinon kaj malsanan patron kaj al malgranda Iva multkolorigis ŝpinileton.

Kaj Raŝica dum tiuj ĉi tagoj ne estis proksime.

Kiam li en Sinj ĉion estis ordiginta por la ringludo, li ekiris hejmen malfrue nokte. Kaj, dum la tuta vojo kaj tra la vilaĝo, li kantis tiel fortege iun hajdukan kanton, ke Beglukanoj sin levadis en siaj litoj pro pli bone aŭdi, kaj tiam ree sin mallevadis dirante unu al la alia: Tiu Raŝica sin ornamis per „kroateco!“

Sed Raŝica eĉ tiun nokton ne estis ebria, kiel ankaŭ neniam dum sia vivo.

## IV.

Ankoraŭ ne malleviĝis la nuboj de l' polvo, kiun levis sennombraj piedoj, revenante de mirakla Virgulino Sinja.

Dum tiuj tagoj, ĉirkaŭ la dekkvina de Aŭgusto, grandega popolamaso kolektiĝas en Sinj dum la festo de Granda Virgulino, en kiu tago dum pli antikvaj tempoj oni ankaŭ aranĝis la ringludon.

Nun oni ludas tri tagojn poste, en la naskiĝtago de l'reĝo.

Kaj tiam super ĉiuj ŝoseoj kaj kampaj vojoj, sur la tuta vasta regiono, komenciĝas leviĝi novaj nuboj, vualigante kelkfoje sennombrajn amasojn da piedirantoj, rajdantoj kaj veturiloj.

En la brilo de l' Aŭgusta suno, sur bruligitaj vojoj, vidiĝas tra la polvo plej diversaj popolkostumoj, sed

da tri koloroj estis plej multe: nigra, blanka kaj blua. Oni dirus, ke ĝi estas longaj bedoj ekflorintaj kun stranga floraro. —

Ĉie nun la popolo kolektiĝis por vidi la brilegan ringludon.

Kaj ĝi viciĝis sur ambaŭ flankoj de larĝa vojo, sur suda flanko de la urbo Sinj, kie oni aranĝas la ringludon.

Jam antaŭ la tria horo posttagmeze, grandaj kaj longaj koridoroj sur ambaŭ flankoj de la kurejo estis tiel plenaj, ke strange estis, ke ili ne detruiĝas. Antaŭ ili, sub ili kaj post ili, sin interpremis alia ankoraŭ pli granda amaso, sin ŝovante kaj tirante por pli bone vidi. Kaj dume venadis novaj kaj novaj amasoj, klopodante forŝovi tiujn, kiuj alvenis pli frue. Kaj sur periferaj urbaj domoj, super la kurejo, sidis homoj eĉ sur la tegmentoj, kaj la lokoj ĉe la fenestroj estis menditaj jam delonge antaŭ tiu tago. Kien ajn oni rigardis ĉirkaŭ la kurejo, ĉio estis kunpremita: kapo apud kapo, ŝultro apud ŝultro, kaj malmultaj havis peceton de oportuna spaco, kie lin oni ne interpremis kaj kie lin ne trovarmigis la suno.

Nur la koridoro de l' ringludanoj kaj tiuj por juĝantoj, estraro kaj pastraro, estis sufiĉe vastaj kaj ŝirmitaj kontraŭ la suno, kaj belege ornamitaj per standardoj, verdaĵo kaj floraro.

Kelkaj vestibloj estis ankoraŭ malplenaj, ĉar tiuj personoj, por kiuj ili estis difinitaj, venis nur antaŭ la komenco de la ludo. Sed sur la aliaj jam nun estis tia interpremado, ke multaj paliĝis pro la ŝovado kaj sufokigo. Kaj tiel oni devis atendi la tutan posttagmezon, sed neniam oni aŭdis, ke iu foriris pli frue ol finiĝis la kurado. Kaj mirige, de tiu amaso oni aŭdis nur mallaŭtan bruon, kvazaŭ venteto blovetas tra arbo aŭ kvazaŭ flugas granda abelfamilio. Ĉiuj atendis ion grandan kaj solenan,

kaj ili eĉ nevole trankviligis fortan eksciton en la brustoj, kaj pro tio eĉ iliaj voĉoj haltis en la gorĝoj.

Tiel pasadis momentoj en somera varmego kaj kun egala bruo, nur kelkfoje ekaŭdiĝadis pli fortaj ekkrioj de tiuj, kiuj ankoraŭ venadis.

Oni dirus, ke la forta suno klopodis endormigi ankaŭ tiun popolamason, kiel ĝi endormigis la vastan ĉirkaŭaĵon.

Subite el la urbo ĝojaj sonoj de la muziko, kiu trairas la urbon, ekaŭdiĝis, sciigante ke la ringludanoj ekiras kaj ke la momento de la ludo estas proksima.

Momente haltis eĉ la spiro en miloj, por ke ili pli bone aŭdu ankoraŭ malproksimajn, sed ĝojajn sonojn, sed poste ĉio reviviĝis pro ĝojaj krioj.

Policistoj, ĝendarmoj kaj militistoj komencis rapide disirigi la homamason, por malplenigi la kurejon, kaj ili viciĝis, por gardi liberan spacon, sur kiu senbare traflugados la feinaj ringludanaj ĉevaloj.

Alvenis jam ankaŭ la juĝantoj en nigraj vestoj kun blua rubando sur la brustoj kiel signo de ilia honoro, pastraro en vestoj ankaŭ nigraj, kaj militistaj oficiroj kaj estraroj en brilantaj vestoj. Kaj ili okupis siajn lokojn en la loĝioj, akompanataj de miloj da okuloj.

Ju pli proksimaj kaj pli laŭtaj la tondraj sonoj de la muziko fariĝis, des pli la koroj batis pli forte, kaj sennombraj kapoj sin levadis al la enirejo de la kurejo.

Kaj fine jen la tiel dezirita momento.

Unuavice iris la muziko, ludante batalmarŝon, kaj post ĝi belegaj cetinaaj „junuloj“ kun sia estro en du vicoj, kun la pafiloj sur la ŝultroj, tenante la tubon en la dekstra mano kaj malantaŭ la dorso.

La tero resonegis sub iliaj pezaj paŝoj, kaj per akra rigardo ili salutas dekstre kaj maldekstre.

Inter ili estis ankaŭ Salko, kun feliĉa kaj ĝoja vizaĝo, kaj vestita belege per patra hajduka vesto.

La surtuto el ruĝa drapo, per ŝnuretoj ornamita kaj arĝentaj tabuletoj sur la dorso. Sur la zono nudaj arĝentaj kaj orumitaj platoj, kaj en flava silka zono belegaj pistoloj, ponardo kaj pulvujoj, ĉio arĝentumita. Sur la ŝultro li tenis grandan silikpafilon, eble iam alportitan el Oriento. Sur lia kapo estis nigra ĉapo kaj silka tuko, kaj la malpeza ŝuvesto estis ornamita per silko kaj ŝnuretoj, kaj li tute rebriliĝis en la sunlumo.

Nur vizaĝo lia estis tute infana; li ne rigardis tiel malserene, hajduke, kiel la ceteraj „junuloj", sed lia rigardo estas milda kaj ĝoja, kvazaŭ sur herbejoj en la kampo.

Malantaŭ la junuloj de l' ringludanoj iris fiere la ŝildportanto kaj la ŝildo apogita sur la brusto rebrilis strange, — kaj flanke la bastonegportantoj kun bastonegoj sur la ŝultro. Kaj ili estis vestitaj kiel la „junuloj", kiuj iris antaŭ ili.

Kaj Edek, granda ĉevalo, kun ĉio tio, kion bezonis la heroo en antikva tempo irante en la batalon — kaj piedojn ĝiajn apenaŭ oni vidas sub la silka kovrilo. Ĝin gvidis du fortaj junuloj tenante la bridojn de la ĉevalo, por ke ĝi ne saltu pro la tumulto kaj muziko, tinto de l' armilaro kaj ornamaĵo.

Malantaŭ ĝi rajdis la adjutanto de l' gvidanto, kaj en lia mano brilis nuda sabro. Kaj la gvidanto mem sur la plej bela ĉevalo kaj en la plej bela vesto, kiu tute rebriliĝis de oro kiel la suno.

Post tio la ceteraj ringludanoj, du post du, unu pli bela ol la alia, ludetante kun la ĉevaloj kaj obstinstarigante ilin kelkfoje per la maldekstra mano sur la malantaŭajn piedojn, sed tamen en bona ordo. Ĉiuj el ili en la dekstra mano tenis la batallancon, iomete apogitan sur la dekstran ŝultron, rigardante serioze kaj akre, pretaj por la saluto.

Ornamaĵoj sur la ĉevaloj forte tintis, kaj blankaj ĉapelplumoj de la ringludanoj tremetis kvazaŭ delikataj herbetoj en la vento.

Kiu la unuan fojon ekvidis tiun taĉmenton, ektremis, kaj al li ŝajnis, ke li estas en iu nova mondo neniam vidita, kaj li forgesis pri si kaj ĉiuj, kiuj estas ĉirkaŭ li. Kaj fakte: brilege vestita taĉmento de ringludanoj ŝajnas kvazaŭ belega songô, tiel malmulte simila al la ĉiutaga realeco.

Kiel lasta iris Alaj-heroldo en nigra veluro brodita per arĝento, tenante longan lancon etenditan antaŭ si kiel signon de sia rajto, ĉar li zorgas kaj responsas pri la ordo kaj konduto de la ringludanoj.

Ĝuste antaŭ Alaj-heroldo Raŝica rajdis fiere sur sia Arap, rigardante fiere kaj malserene al la vestibloj. Kaj li vere estis belega, eble la plej bela el ĉiuj ringludanoj kaj plej simila al antikvaj kroataj kavaliroj. Vesto lia estis brilega, ke ne povas esti pli brila, kaj farita laŭ heroeca kostumo el la tempo de Cetinaaj grafoj Nelepiĉ, sed preskaŭ egala al tiuj de la ceteraj ringludanoj. Ĝi nur aspektis pli riĉa, ĉar Raŝica ne ŝparis la monon.

Kaj pri la nigrulo kaj vesto sur ĝi ĉiuj enviis lin, kvankam sur tiu nigrulo neniu alia kuraĝus rajdi krom Raŝica.

Li ja estis estinta kun ĝi dufoje en la provkurado, kiun oni aranĝis kelkajn tagojn antaŭe, sed la nigrulo eĉ nun timis kaj nur la fera mano de Raŝica ĝin tenis en la vico.

La amaso ekbruis, kiam ĝi ekvidis Raŝica-n.

— Jen Raŝica! — kaj oni montradis per la fingroj.

— Vivu Raŝica! — kaj oni svingis per la tukoj.

— Kiu estas ĉi tiu Raŝica? Kie? — demandis multaj.

— Raŝica, hajdukestro! — oni respondis al ili.

— Kie? Kie? — — Kiu li estas?

— La lasta maldekstre! Lasta apud ni! Ĝuste antaŭ

Alaj-heroldo! Tiu bela homo sur la nigrulo maldekstre! — oni kriis de ĉiuj flankoj.

— Lia nigrulo timas!

— Nu, ne timu, lin ĝi ne ĵetos! — respondis la aliaj.

Kaj la taĉmento trairis fiere tra l' amaso, salutante la estraron kaj juĝantojn. La ringludanoj salutis mallevante la pinton de l' lanco teren, la standardportanto per standardo, adjutantoj per sabroj, kaj la gvidanto per la mano.

Kaj la popolo svingis blankajn kaj diverskolorajn tukojn, kaj la kriado resonis kvazaŭ tondrado batala.

Kiam la taĉmento estis veninta al la loko, de kie oni komencas la kuron, la gvidanto ekrevenis, akompanate de siaj adjutantoj kaj la kvar plej bonaj ringludanoj, kaj inter ili estis ankaŭ Raŝica. Kaj kiam ili venis antaŭ la loĝio de l' ringludanoj, la gvidanto kaj adjutantoj malsupreniris de la ĉevaloj, kaj la „junuloj" rapide kaptis iliajn ĉevalojn. La kvar ringludanoj de la akompano tuj revenis per forta galopo al la loko de la kuro. Kaj ĉio tio estis farita tiel rapide kaj serioze, ĝuste kiel en la komenco de batalo, en kiu oni disverŝos multan sangon heroan kaj kiam estas al ĉiu nur la honoro kaj gloro en la menso.

Tiam la gvidanto, liaj adjutantoj kaj standardportanto, eniris en la loĝion de l' ringludanoj, ĝuste apud la juĝantoj, kaj kontraŭ la urba kaj militista estraro.

Kaj la ŝildportanto, bastonegportantoj kaj Edek, kaj la „junuloj" de l' ringludanoj kun sia estro, revenis kaj viciĝis, ĝuste sur la dekstra flanko de la loko, kie pendis „la ringo", kaj tiavice, kiel kuros iliaj mastroj. Kaj tiam, post la ordono, ili mallevis unuece kaj tondre la pafilojn al la piedo.

Salko estis ĝuste apud la dekstra kolono, kaj kiam li ekrigardis al la alia flanko de la kurejo antaŭ si, li ekvidis en

la amaso da junulinoj Marta-n lin rigardanta. Tuj li rimarkis, ke ŝi estas maltrankvila kaj iomete pala, sed tamen ŝi al li ekridetis, sed tiel malĝoje, ke lia koro ekmalvarmiĝis. Kaj dum la tuta kurado, kiam li ne havis la servon, li rigardis nur ŝin, ĉar ŝi al li ŝajnis terure stranga.

Intertempe, de la loko kie oni komencas la kuron, venis kun akra paŝo al „la ringo“ Alaj-heroldo, kaj sin starigis, por priatenti la ordon kaj konduton de la ringludanoj, kaj preta por ordonoj de la gvidanto kaj juĝantoj. La tumulto fariĝis des pli malgranda, ju pli granda la streĉeco estis, kaj kiam Alaj-heroldo sin starigis antaŭ la loĝio de la gvidanto sciigante al li, ke estas ĉio preta por la kuro, ekregis tia trankvilo, kvazaŭ neniu tie estas. La gvidanto ion diris al la juĝantoj kaj sin turnis al Alaj-heroldo kaj ordonis, ke oni komencu la kuron. Ĉi tiu ekkriis al la trumpetisto kaj tuj la voĉo de l' trumpeto meze de ĝenerala trankvilo disvastiĝis malproksimen, kaj la lancoj kaj ĉapelplumoj de l' ringludanoj iomete ektremis. Ekaŭdiĝis forta piedfrapado de rapida ĉevalo, kiu pli kaj pli rapidas. Sur ĝi aperis juna ringludano, pala kaj kun jam mallevita lanco, rigardante akre en la ringon, al kiu li proksimiĝis en forta kuro. Tiu junulo vetkuris unuafoje, kaj oni vidis tion, ĉar li iel necerte tenis la longan lancon kaj kelkfoje dum la kuro ekrigardis inter la orelojn al sia ĉevalo.

La pinto de lia lanco preterpasis rapidege apud la ringo, sed ne tuŝis ĝin.

Lia „junulo“ tuj forkuris post li kaj revenis gvidante lian ĉevalon, kaj la juna ringludano, ankoraŭ pli pala ol antaŭe, supreniris en la loĝion de l' ringludanoj.

Mallonga tumulto kaj rido de infanoj kelkloke, kaj ree trankvilo kaj silento.

La trumpeto eksonis duafoje — kaj ree aŭdiĝis la piedfrapado de ĉevalo kaj tinto de l' arĝento, pli kaj pli forte. Kuris la dua ringludano, granda kaj nigra, sur malgranda flava ĉevalo, sed rapida kvazaŭ fulmo. Tiu trafis en numeron du kaj forrapidis.

Ĝoja tumulto ekbruis en la amaso kaj rapide ĉesis, kaj la „junulo" de tiu ringludano rapide sin starigis antaŭ la loĝio de l' ringludanoj por ĝisatendi sian mastron. Jen ankaŭ li kun la ringo sur la lanco, sed egale serioza kaj malserena. Li vigle alrajdis antaŭ la juĝantojn, mallevis la ringon kaj salutis per la lanco la estraron, juĝantojn kaj gvidanton; li transdonis al la „junulo" la lancon, forrajdis al la loko por la ĉevaloj kaj revenis piedirante en la loĝion de l' ringludanoj.

Kaj tiel la sono de l' trumpeto unu post la alia.

La tria ringludano ricevis ree numeron du, la kvara unu, la kvina unu, la sesa ree du, la sepa nenion, la oka nenion, la naŭa numeron unu, kaj kiel la deka devis kuri Raŝica.

Kaj lia nomo komencis ree soni el cent gorĝoj. Centojn da demandoj kaj centojn da respondoj alvokadis ili unu al alia. Unue, ĉar li estis famekonata kiel hajdukestro kaj belega homo; due, ĉar li plaĉis al ĉiuj kun siaj heroeca staturo kaj belega vesto, kaj trie, ĉar ili vidis, ke lia nigrulo estas tre timema, kaj ili timis, ke li ne gajnos la ringludon kaj, kio estos ankoraŭ pli malbona, ke lin ĵetos la flamanta Arap. Kaj fine, ĉar estis unuafoje, ke li kuras, kaj ĉar li estas el vilaĝo, kaj la popolo plej deziris, ke ĝuste li gajnu.

Kaj kiam la trumpeto dekan fojon eksonis, ĉiuj sin levis de siaj lokoj, komencis sin levi sur la piedfingroj kaj kapti unu la alian je la ŝultro, sed voĉon oni ne aŭdis.

Raŝica alproksimiĝadis kun grandega rapideco. La

nigrulo sin etendis, kaj ŝajnis, ke li eĉ ne tuŝas la teron, sed nun ĝi estis blanketa, ĉar ĝi estis tute kovrita per ŝaŭmo.

Raŝica ĝin elturmentis por ĝin trankviligi.

Kaj nun li, iomete kliniĝinta al la kolo de sia ĉevalo kaj kun levita lanco, rajdis kun nevidita rapideco al la ringo, ke lian vizaĝon oni eĉ ne povis vidi. Sed kiam li estis proksime, li rektiĝis, celis per la lanco, kaj la lanco traflugis la mezon de la ringo.

Tondra aplaŭdo, fiera kriado kaj venkaj sonoj de la muziko bruis kvazaŭ tempesto. Kaj miloj da multkoloraj tukoj ekŝvelis tra la aero, kvazaŭ diverskolora floraro, kiam ĝin ondigas la vento.

Kiam Raŝica revenis kun la mezo de la ringo sur la lanco, la svingado kaj krio fariĝis ankoraŭ pli granda, kaj Salko, starante rektiĝinta antaŭ la loĝio de l' ringludanoj, ekrigardis eĉ nevole tien, kie staris Marta.

Kaj li vidis, kiel ankaŭ ŝi svingis tukon kaj kriis ion, ŝanĝiĝinta en la vizaĝo, kvazaŭ ekster si. Sed ŝin, en tiu granda tumulto, neniu rigardis krom Salko. Vidinte ŝin tia, estiĝis al li malbone kaj li apenaŭ kaptis la lancon kaj ĉevalon de sia patro, sed akra rigardo de lia estro lin ree trankviligis, — li eĉ ekridetis, kiam li vidis sian patron. Sed estis ia stranga rido, spasma kaj streĉita.

Post tio oni daŭrigis la kuron kun diversa feliĉo, kaj kiam estis kurinta triono de la ringludanoj, paŝis Alaj-heroldo al la gvidanto, nomis al li sian anstataŭanton kaj foriris, por sin prepari por la kuro, ĉar Alaj-heroldo kuras ĉiam kiel la lasta.

Li estis homo el malnova kavalira familio sinja, en la plej bona forteco, heroeca kaj bela.

Ekzistis kelkaj tiaj antikvaj kaj riĉaj familioj, en kiuj

naskiĝis nur kuraĝuloj, kiuj famekonatiĝis en diversaj epokoj: antaŭe sur la batalkampoj, kaj poste sur la kurejo de l' ringludo.

Kaj la nuna Alaj-heroldo estis el tia familio kaj venkinto en multaj ludoj, kaj malfacile estis trovi iun simile kuraĝan kaj spertan inter la ringludanoj.

Tial denove sin levis la kapoj kaj fariĝis interpremado kaj batalo por pli bona vido, kaj poste silento kvazaŭ en senhoma kampo dum somera tagmezo.

La trumpeto eksonis tra la trankvilo, kaj ree forta piedfrapado kaj tinto de l' ornamaĵoj kaj armilaro. Kaj belega blankulo traflugis kvazaŭ fulmo tra grandaj vicoj kaj la lanco de Alaj-heroldo traflugis fulme la mezon de la ringo.

Post tio same kiel antaŭe, kiam kuris Raŝica, tondraj ĝojkrioj kaj aplaŭdo, venkaj sonoj de la muziko kaj salutoj per multkoloraj tukoj.

Nun la amo de la amaso dividiĝis inter Alaj-heroldo kaj Raŝica, kaj Salko denove ekrigardis Marta-n kaj ekridetis malbondezire. Li deziris en tiu momento tutkore, ke ne venku lia patro, kaj li mem ĝuste ne sciis kial. Ia sortfatala antaŭsento premis lian animon, kiam li vidis la ŝanĝiĝintan vizaĝon de Marta.

Kiam finiĝis la unua kuro, la tuta ringludana taĉmento kolektiĝis kaj viciĝis kiel en la komenco, kaj solene trairis la kurejon.

Kaj tiam ĝi denove sin starigis kaj komenciĝis la dua kuro.

Kaj ree iuj ricevis numeron unu, iuj numeron du, kaj iuj nenion. Kaj kiam venis la vico al Raŝica, li ekflugis kvazaŭ fulmo kaj kiam li revenis, estis ankaŭ duafoje la ringo kun sia mezo enigita sur la lancon. Kaj la bruo inter la popolo fariĝis ankoraŭ pli granda ol unuafoje.

Post tio la tumulto trankviliĝis, kaj iuj komencis trankvile rigardi la kuron de aliaj ringludanoj, sed la pli-

multo interparolis pri kio ajn, sed plej multe pri Raŝica kaj Alaj-heroldo.

Tamen denove, kiam devis Alaj-heroldo kuri, fariĝis trankvilo, kaj ree pli vigle ekbatis ĉiuj koroj.

Sed ankaŭ Alaj-heroldo trafis ree en la mezon de la ringo, kaj granda maltrankvilo okupis ĉiujn.

Nova kriado, aplaŭdo, muziko kaj svingado per tukoj. Kaj longa tempo pasis, ĝis trankviliĝis la popolo.

La suno pli kaj pli malforte bruligis kaj ekblovis malpeza okcidenta vento, portante la polvon de la kurejo, kaj la popolo fariĝis ankoraŭ pli ĝoja.

Inter la dua kaj tria kuro la vico de l' ringludanoj trairis trian fojon egale fiere kun la muziko, kaj tremis la tero pro piedfrapadoj de multaj ĉevaloj.

Ies granda, flava kaj hirta hundo, kun subtirita vosto, de ie aperis malĝojbojante.

Ĝi kuris tien kaj reen sur la kurejo, sin tirante inter ĉevalaj piedoj. Ĝi volis kaŝiĝi inter la popolo, sed kiam ajn ĝi paŝis al iu amaso, tre ili ekkriis al ĝi, kaj ĝi ankoraŭ pli multe malĝoje ekbojis kaj forkuris al alia amaso. Sed ankaŭ tie ili ĝin ĝisatendis kun granda krio, kaj ĝi timigite forsaltis aliflanken.

Granda rido eksonis en la amaso, sed Salko-n tiu rido malĝojigis ankoraŭ pli. Kaj nur strangaj pensoj kaj strangaj sentoj ondumis en lia animo. Al li ŝajnis, ke al li estas same kiel al tiu hundo, kaj ke ĉiuj ceteraj estas kontentaj kaj feliĉaj.

— Kaj kial ŝi lin tiel rigardas? — li pensis en si, kiam li ekrigardis Marta-n, kiu senĉese serĉis per la okuloj lian patron. Kaj tiuj okuloj estis tiel strangaj kaj miregantaj, kiam ili falis sur Raŝica-n, kaj io ekbrilis en ili!

Al Salko ŝajnis — kaj terure ekmuĝis en lia kapo, kiam li pri tio ekpensis — ke tio povas esti amo. Kaj li

komencis vicigi en la pensoj ĉiujn okazintaĵojn de lasta tempo, kiuj al li pravigis ĉi tiun teruran suspekton.

— Kial ŝi min neniam rigardas aŭ kial ŝi min ekrigardas tiel malĝoje, kvazaŭ mi estas tiu hundo, pri kiu ili tiom ridis? — li pensis ree. Kaj ŝi scias, ke mi estos ŝia edzo!

Kelkfoje li komencis sin eĉ konsoli, pensante, ke tio, kion li pensas, ne estas ebla:

— Kiam li formetos tiun veston, denove li estos kiel ĝis nun, kaj ŝi amos min kiel antaŭe, ĉar mi estas pli bela kaj pli juna.

Kaj ĉe tiu penso ektremis ree la ĝojo en li kaj ekardis la amo en plena ardo kaj kun la tuta forto de l' juna animo, kiu unuafoje amas.

Kaj la vizaĝo de Marta rebrilis kun tia feliĉo kaj mildeco, ke li plej ŝatus ekflugi, ĉirkaŭpreni ŝin tie antaŭ la tuta popolo kaj forporti de tiu tumulto kaj de antaŭ tiuj ringludanoj, kiuj al li ŝajnis kvazaŭ junaj reĝoj. Kaj li deziris, ke ili ambaŭ estu sur tiu kurbiĝo de Cetina, kie ilin neniu rigardis, kiam ili kisadis unu la alian.

Sed en la sama momento la feliĉo kaj mildeco sur ŝia vizaĝo ŝajnis al li io tre malproksima kaj io, kun kio li havas nenian kontakton.

Kaj vere, kiam ajn Marta ekrigardis Salko-n, ŝanĝiĝis ankaŭ ŝia vizaĝo kaj fariĝis malĝoja kaj malmilda. Ne estis tiel, ke ŝi lin rigardis malserene, sed, kvazaŭ ŝi lin bedaŭras. Sed kial? Nun ŝi ja almenaŭ devas esti ĝoja, ĉar nenio plu al ŝi restas por deziri — kiel ankaŭ al mi? — Kaj eble al mi nur tiel ŝajnas? —

Ekaŭdiĝis denove sono de la trumpeto pli forte kaj pli tondre, kaj nun komenciĝis la tria kaj lasta kuro, kiu decidas pri la venko.

Sed ankaŭ en ĉi tiu tria kuro malmultaj zorgis pri la ceteraj ringludanoj kaj nur kalkulis, kiom da ili devas

ankoraŭ trakuri ĝis Raŝica kaj Alaj-heroldo. Ĉar nun estis klare, ke neniu krom ili du povas esti venkanto en la ludo.

Sed ankaŭ la tria kuro pasis same kiel la antaŭaj du: Raŝica kaj Alaj-heroldo trafis ankaŭ la trian fojon en la mezon de la ringo.

Ĉiuj ekmiregis, kaj la popolo estis kvazaŭ ekster si: neniam ja io simila okazis, de kiam ili rememoras.

Inter la juĝantoj fariĝis vigla konsilado, kaj la ceteraj ringludantoj foriris, jam lacaj, en sian vestiblon.

Granda maltrankvilo okupis la urbanojn kaj vilaĝanojn de Cetina, kaj neniom pli malmulte ankaŭ tiujn, kiuj alvenis el pli malproksimaj regionoj.

Kaj ĉiu sciis, ke nun devas vetkuri pri la venko nur ili: Raŝica kaj Alaj-heroldo.

Kaj baldaŭ alrajdis la adjutanto de la gvidanto kaj anoncis novan kuron, kaj la paro forrajdis ree al la loko, de kiu oni komencas.

Kiam ekaŭdiĝis en la trankvilo la forta sono de kupra trumpeto, multaj paliĝis — unuj malfermis la buŝojn kun tre rigardegantaj okuloj, kaj iuj eĉ etendis la manon kvazaŭ lancon kaj levis unu piedon, kvazaŭ ili mem kuros.

La bela nigrulo de Raŝica, kvazaŭ ĝi kuras unuafoje, apenaŭ tuŝis la teron en la kuro. La dolmano sur Crnoŝija flugis kvazaŭ flugiloj de rabobirdo, kaj li, kun kunpremitaj dentoj kaj sulkiĝinta frunto, flugis pli kaj pli proksimen.

Iom antaŭ la ringo li levis la lancon kaj traflugigis ĝin ĝuste la mezon, kvazaŭ li ĝin eĉ ne estas tuŝinta.

Sed tuj post tio li forte eksvingis la lancon, kaj la ringo ekflugis tra la aero antaŭen.

Terura, oni dirus, besta ekkrio, furioza kaj duonfreneza, ekaŭdiĝis de la amaso. Sed Raŝica en la sama

momento, kaj ĉio en la kuro, submetis la lancon, kaptis la ringon enmeze kaj malaperis en la urba strato.

Sed nun eĉ ne voĉo aŭdiĝis. Kvazaŭ la morto per sia nigra flugilo transiras la tutan amason, ŝtopas ĉiujn gorĝojn kaj lignigas ĉiujn manojn. La muzikistoj, kiuj devis ekludi venkan marŝon, forgesis sian devon kaj ĉiu kun sia instrumento en etendita mano rigardis tiun miraklon kaj foriris de sia loko en la mezon de la kurejo.

Tiel estis dum kelkaj minutoj, ĝis ili ekvidis Raŝica-n revenanta, ŝvitanta kaj ruĝa, kaj la lanco iomete tremis en lia mano. Oni vidis, ke ankaŭ li estas kortuŝita.

Sed nun, kiam ili lin ekvidis, la popolo kvazaŭ frenezigis. Iuj komencis eĉ plori, kaj iuj frapis per la piedoj kaj ĵetadis ĉapelojn kaj ĉapojn aeren.

La popolo elrapidis de siaj lokoj kaj ne estis forto, kiu ilin povis haltigi. Kaj fariĝis terura tumulto kaj tia furiozeco, ke ĝi trankviliĝis apenaŭ tiam, kiam aŭdiĝis malespera ploro de virinoj kaj krio de timigitaj infanoj.

— Kio okazis? — ili demandis unu la alian.

Kaj ĉiuj kvazaŭ ebriaj ŝanceliĝis kaj sin ŝovis al siaj lokoj, antaŭ la bajonetoj de l' ĝendarmoj.

Salko kvazaŭ ŝtoniĝis kaj eĉ ne alkuris al sia patro por kapti liajn ĉevalon kaj lancon, kiel estis lia devo, sed Raŝica, post kiam li estis transdoninta la ringon al la gvidanto kaj juĝantoj, malsupreniris sola kaj komencis ĉirkaŭpreni sian Arap kaj kisi ĝian ŝvitan kaj brilan kolon.

Kaj plu ne estis trankvilo.

Kvankam Alaj-heroldo kuris kaj trafis la mezon de la ringo eĉ kvaran fojon, la popolo kriis kvazaŭ furioza senĉese al la gajninto Raŝica, al kiu ili enkalkulis numeron ses por la nura lasta fojo. Ĝi kriegis senbride eĉ tiam, kiam la gvidanto pendigis silkajn ŝnuretojn sur la venk-

intan lancon de Raŝica, ankaŭ tiam, kiam li fine parolis pri la gloro de cetinaa heroeco.

Kaj kiam ĉio freneziĝis, invadis la ondoj de l' miloj da korpoj al Raŝica kaj haltadis subite antaŭ li, kaj tiam ili pli kaj pli ondiĝis.

Kaj la ringludo finiĝis en tumulto kiel neniam: apenaŭ oni sukcesis iel viciĝi kaj forakompani la gvidanton.

— — — — — — — — — — — —

Jam krepuskiĝis kaj komenciĝis belega somera nokto senluna. Sur la ĉielo malforte trembrilis palaj steletoj, kaj super la urbo etendiĝis nubetoj de la polvo kaj fumo — kaj amasoj post amasoj foriris diversflanken. Tra la stratoj sonis kantoj, interparoloj kaj paŝoj.

Sed ankoraŭ pli frue ol fariĝis plena nokto, renkontis Raŝica Marta-n, kiu jam kun la kunulinoj estis reveninta al Begluk.

Li iris sola kaj piede, sed ankoraŭ en ringludana vesto, por sin lavi kaj purigi. Kiam li ekvidis Marta-n, liaj piedoj iomete ektremis, ĉar li estis tre elturmentita kaj maltrankvila, kaj nun, kiam li ekvidis ŝin, al li lia tuta hodiaŭa gloro ŝajnis tre malgranda. Pro tio li volis rapide preterpasi, por ke ŝi lin ne vidu, sed Marta postrestis el la amaso de la Beglukaninoj, kaj ankaŭ Raŝica haltis kvazaŭ alforĝita.

Momenton ili sin rigardis silente, sed kiam Marta eksingultis, li prenis ŝiajn manojn mirigite.

— Kio estas al vi? — li diris al ŝi — aŭ ĉu vi havas ion por diri al mi? Mi faris, kion vi deziris, kaj . . .

Sed Marta proksimiĝis al li kaj flustris mallaŭte:

— Vi min ne komprenis . . . mi neniam edziniĝos kun Salko — nek viva nek mortinta. . .

Kaj li volis ŝin ĉirkaŭpreni, sed ŝi sin eltiris kaj ekrapidis por atingi siajn kunulinojn, kiuj jam malproksimiĝis antaŭ ŝi.

V.

De tiu tago fariĝis peza batalo en la animo de Raŝica. Jam frumatene li foriradis kun pafilo sur la ŝultro kaj revenadis malfrue nokte, nur por ne paroli kun Salko kaj eĉ ne kun Marta, ĝis sereniĝos inter ili. Li sciis, ke tio okazos, kaj pro tio li vagis tra la kampo kaj montoj kaj tie, kie li renkontos neniun vivan. Sed al Raŝica ja ne estis malfacile, tie iri sola: la herbejoj estis falĉitaj jam delonge kaj la maizo forportita de la kampoj, kaj ĵus nun oni senŝeligadis ĝin antaŭ la staloj, sur draŝejoj vilaĝaj.

Kaj Raŝica ne ĉasis, sed li sidadis en iu ŝirmita loko kaj meditis kaj enmensigadis ĉion, kio okazis kaj kio povos okazi.

Li sciis, kiel malfacila sorto atendas lian filon, kaj meditis, kiom li estas kulpa pri lia malfeliĉo. Kaj fine li konkludis, ke ne li estas kulpa, sed Marta: pro tio ŝi ankaŭ decidu laŭ sia volo, kaj li sin tenos malproksime kaj ne estos kulpa. Kaj estu ĝuste tiel, ke al li nek Salko nek la mondo povos ion riproĉi.

Tamen foje al li ŝajnis, ke li devas diri al la filo almenaŭ ion ajn, ĉar li estas l i a, — kaj tiu penso lin levadis kaj li komencis mortigi la birdetojn, kiuj saltetis sur arbetaĵoj. Ĉar tie ne estis alia ĉasaĵo, li mortigis ilin, kaj ŝajnis al li pli facile.

Kaj Salko volis iri al Marta por sciiĝi, kion ŝi pensas, sed ŝi tuj la duan tagon post la ringludo estis foririnta en la montaron al iu parencino, kiu somere loĝis tie, unu tagon da irado malproksime. Ŝi esperis, ke baldaŭ okazos „io“, kaj ke tiu „io“ devos plifaciligi ŝian animon kaj

fari, ke ŝi estu kulpa pri nenio. Kaj ĝuste pro tio, kio okazos, ŝi ne devos paroli: ŝi estis preta por ĉio, sed ŝi ne povis decidi ion. Kaj por tio, pri kio ŝi esperis, ke ĝi okazos, laŭ ŝi sufiĉos du tagoj. Sed ŝi eĉ la duan tagon ne revenis, kaj en la komenco de la tria Salko sciiĝis, ke ŝi venos vespere.

Li tuj ekserĉis sian patron kaj trovis lin sub iu monteto, sur la loko, de kie oni povis trarigardi la tutan kampon. Tiu monteto en la antikva tempo estis tombejo, kaj eĉ nun inter la arbetaĵoj kuŝas grandaj tabuloj, po du arŝinojn dikaj kaj kelkloke volvitaj per verda kaj flaveta musko.

Sur tiu monteto kreskis multe da maljunaj kverkoj, ulmoj kaj karpenoj, kaj iom pli malsupre, sur la herbejoj, viciĝis poploj kaj salikoj. Proksime muĝis Cetina, sin ŝovante tra la ŝtonaro, kiun homoj dum senpluva tempo alrulis por transiri sur la alian flankon.

Kaj ĉi tiu monteto estis nomata la Birda monteto, ĉar tien, kiel en lokon senhoman kaj arbohavan, ĉiun vesperon alvenadis miloj da birdoj ĉiuspecaj, por tie pasigi la nokton. Ĝi estis tiel senviva kaj malluma, ke nokte neniu riskis veni sur tiun monteton, kaj eĉ tage malofte.

Kaj strangajn aferojn pri ĝi oni rakontis: ke tie en antikva tempo iuj edziĝfestantoj estis mortigitaj de Turkoj, kaj ke eĉ nun, dum mallumaj noktoj, la fianĉino kun la fianĉo, ĉirkaŭprenantaj unu la alian kaj ĉiu kun kandelo en la mano, tie iras, ke en ĝi la tutan nokton io vekrias kaj bojas, kaj maljunaj kverkoj promenas kiel vivaj, etendante grandajn radikojn antaŭ si. Kaj multaj subite malsaniĝis, kiam ili venis sur la monteton, kaj longe plu ne vivis. Sed tiel okazis jam antaŭ longa tempo, ĉar nun neniu plu venas al tiu loko. Tial kreskis sur la Birda monteto la herbo ĝis la genuoj kaj la malnovan

tomban ŝtonaron apenaŭ oni vidis sur ĝi, ĉar nek iu falĉis tiun malbenitan herbon nek tie paŝtis.

En tiu arbetaro naskiĝadis vulpoj, musteloj kaj sennombraj serpentoj, kaj vintre tie estis eĉ lupoj.

Cetere la ĉasantoj malmulte venadis sur la monteton, ĉar ĝi estis tiel malbonfama. La Cetinaanoj timis nek ponardon nek pafilon, sed ili timis fantomojn kaj mortintojn, pri kiuj al ili oni rakontis jam tiam, kiam ili eĉ ne povis kompreni, kion al ili oni parolas.

Kaj ĝuste sub tiu monteto Raŝica, apud iu malnova ŝtipo kun piedoj kvazaŭ serpentoj, kuŝis kun pafilo sur la sino, kiam al li venis Salko.

Estis ankoraŭ longe ĝis la tagmezo kaj estis la lastaj tagoj de la Aŭgusto, sed ili plu ne estis tiaj kiel antaŭ la ringludo. La aŭtuno tiun jaron kvazaŭ fruiĝis.

Sufokiga sudvento dum kelkaj tagoj komencis ruli grizajn nubojn, kaj la ĉirkaŭaĵo malheliĝis, ĉar la suno ne povis trabori la sufokitan ĉielon. La akra vento forte muĝis tra l' arbetoj kaj arboj kaj ĉiumomente fariĝis pli kaj pli forta, kaj rulis pli kaj pli grandajn kaj nigrajn nubojn, sed ne pluvis. La arboj en la senhoma kampo fleksiĝis kaj terura muĝo transblovis ilin, kaj ŝajnis, ke ĝuste tiu muĝo kaj ne la vento, fleksas la poplojn kaj salikojn.

— Vi al mi diris, ke mi edziĝu kun Marta, se mi volas eĉ morgaŭ! — ekkriis Salko al sia patro por superi la muĝon de la vento.

Kaj dum Raŝica mirigite sin levadis por sidiĝi, li daŭrigis kriante:

— Jen eĉ la aŭtuno! — Kaj vi min evitas kaj ne parolas kun mi, kaj Marta ankaŭ ne estas ĉi tie, kaj al mi ĉio ŝajnas iom stranga! . . . Vi estas mia patro, nun helpu min kaj diru, kion mi faru!

Kaj Raŝica mallevis la kapon kaj, pripensinte iomete, respondis mallaŭte:

— Iru, kaj petu ŝin pri ŝia mano!

— Kio? . . . — ekdemandis Salko klinante sin al li, ĉar la vento muĝis pli kaj pli forte.

— Iru, por demandi ŝin! — ekkriis Raŝica kaj ekrigardis lin nur por momento kaj tuj mallevis la okulojn.

— Ŝi venos hodiaŭ al la monto, — diris Salko — kaj bezone estas, ke ankaŭ vi iru! . . . Kaj vi scias, kia estas la moro — mi eĉ ne bezonas iri. Iru vi sola aŭ prenu iun kunulon, kaj svatu por mi. . .

— Sed estas necese unue paroli kun la fraŭlino. . .

— Mi ja parolis kun ŝi eĉ ne nur unufoje! . . .

— Vane . . . tio ankaŭ estas la moro. . .

— Kion vi diras? . . .

— Parolu kun ŝi ankoraŭfoje kaj mi iros! . . .

— Vi scias, ke mi ne plu havas patrinon, kaj kiu parolos por mi, se vi ne faros tion!

Tiu rememoro pri la patrino kortuŝis Raŝica-n tre kaj li ne kuraĝis ekrigardi Salko-n. Kaj ĵus li volis diri al li ion sinceran kaj mildan, sed — iu kvazaŭ lin haltigis — li malsereniĝis kaj diris akre:

— Iru ankoraŭ hodiaŭ vespere, mi diras al vi, kaj parolu kun ŝi, kaj morgaŭ mi svatos . . . kaj estu trankvila!

Kiam Salko foriris konsolita kaj ĝoja, estis Raŝica tiel ekscitita, ke li tutan tagon kaj tutan vesperon ne revenis en la vilaĝon. Li iris kun pafilo sur la ŝultro tra la kampoj kaj arbaroj malgraŭ forta vento, ankoraŭ eĉ kiam fariĝis tiel nigra nokto, ke li eĉ ne vidis kien li paŝas.

Ie en la malproksimo resonegis terure, kvazaŭ skuiĝas la fundamentoj de la tero, kaj Raŝica haltis por

aŭskulti. Li aŭskultis kaj rigardis ĉion ĉirkaŭ si, sed en lia menso estis senĉese Salko kaj Marta.

Salko-n li tre bedaŭris, kaj kiam venis antaŭ liajn okulojn lia malĝoja kaj zorgema vizaĝo, io komencis lin sufoki en la gorĝo kaj li ne povis spiri. Kaj kiam li rememoris la vortojn de Salko: „Mi ne plu havas patrinon, kaj kiu parolos por mi?“ li vere ekploris kaj sidiĝis sur la vastan herbejon kun la decido, ke li iom konsciiĝos kaj trapensos kion fari.

Sed depost kiam li iomete sidis, li ekpensis ree: „Kaj kion mi povas helpi al li, se ŝi lin ne volas? Kial ankaŭ mi estu sen Marta, se li devas esti sen ŝi? Kaj Marta, mia Marta milda. . .“

Kaj tiam li daŭrigis vagi tra la nokto en tiuj senhomaj lokoj.

La sudvento kaj nuboj pli kaj pli premis la regionon de Cetina, kaj la forta vento portis la nubojn de l' tero de la malproksimaj kampoj, kvankam ilin oni ne vidis. Sed la eroj de l' seka tero akre frapis la vizaĝon de Raŝica en la kampo kaj ankaŭ Salko-n, kiu en solena vesto ekiris al Marta, tra la profunda strato sub Begluk.

Li estis en la hajduka vesto de sia patro, kiun li havis ankaŭ ĉe la ringludo, kun la pistoloj, pulvujoj kaj ponardo sur la zono, sed sen la fremda pafilo, kiun oni alportis de Oriento.

En tiu bela kaj heroeca vesto pligrandiĝis liaj esperoj, kaj li paŝis tiel ĝoje, ke li kelkfoje eksaltetis, kaj nigran penson li havis neniun. Lin tute regis la juneco kaj amo, kaj ju pli forte lin frapis la vento, des pli ĝoja li estis.

Nur kiam li eniris en la domon de Marta, lin io ekmalvarmigis en la animo, ĉar li trovis Marta-n plorinta, kaj patrino ŝia Stana ne ĉesis plori, eĉ kiam ŝi ekvidis Salko-n.

Ambaŭ sidis apud la fajrejo kun eta fajro, kaj la lito de la patro estis iom pli malproksime en plena mallumo. Kiam Marta estis reveninta, ŝi tuj estis vidinta, ke nenio ŝanĝiĝis kaj ke ŝin atendis la samaj cirkonstancoj, kiel ŝi ilin restigis forirante. Tia ŝi prenis kuraĝon kaj ĵus ion pli frue finis rakonti al la patro kaj patrino pri sia amo. Sed kun malmulte da vortoj strangaj kaj nedifinitaj, kiujn ŝi interrompadis per peza ploro, kiu kelkfoje daŭris longe, sen iu vorto. Kiam ŝi iom trankviliĝis, denove ŝi ion diradis, sed oni vidis, kiom malfacile estas al ŝi paroli, sed ke ŝi tion ankaŭ devas. Kaj ŝi mem sentis, ke estas la lasta tempo por ĉion diri.

Ŝia patro, elturmentita de malfacila malsano, malmulton komprenis de tuta ŝia rakonto. Nur kiam Marta pli forte ekĝemadis, li levis per ekzercita movo de siaj malgrasaj manoj la kovrilon kaj kun enfalintaj okuloj rigardis la vizaĝon de Marta, kiu skuiĝis plorante. Li komprenis, ke ŝi suferas multe, sed pro doloro alia ol la lia, kaj ke li ne povas ŝin helpi. Li tial transĵetadis ree la kovrilon trans la kapon kaj mem ekploradis, senforte kaj mallaŭte, kiel homo, kiu jam alkutimiĝis suferi.

Malgranda Iva jam dormis . . . sed Stana komprenis ĉion!

Ŝi rememoris Raŝica-n kaj sin, iliajn junecon kaj amon, kaj perceptis tute, kio estas inter li kaj Marta. Sed ŝi povis nenion al ŝi diri, ĉar ankoraŭ nun Raŝica por ŝi estis la plej bela kaj plej bona homo en la mondo, kia nenie ekzistas.

Sed tamen ŝin lia amo por Marta kortuŝis forte, kvankam ŝi sciis, ke Raŝica ŝin amas nur pro tio, ĉar ŝi estas simila al ŝi, kaj ke al ŝi en lia kastelo nenio malsufiĉos. Ŝin kortuŝis, ke Raŝica tiel frenezete enamiĝis

en ŝian filinon, kaj ŝi sentis malĝojon kaj maltrankvilegon pli grandan, ol kiam li edziĝis kun Luca. Tiam ŝi ja bone sciis, ke li edziĝas nur tial, por ne resti sola kaj por ne esti por la Cetinaanoj kaŭzo de moko.

Pro tio ŝia koro estis sur la flanko de Salko, — sed ŝi pripensis ankaŭ tion, ke en la okazo de Marta ankaŭ ŝi estus tia.

Salko haltis kvazaŭ enfosigita apud la fajrejo, mirigita, ke al li neniu respondas kaj terurigita de iliaj mallevitaj kapoj kaj plorintaj vizaĝoj.

— Kio okazis? — demandis li ree ilin, sed tiel timigite kaj humile, ke ambaŭ lin ekrigardis. Kaj Stana, vidinte lian bonan kaj infanan vizaĝon, eksaltis kaj ĉirkaŭprenis lin, malsekigante per ankoraŭ pli abundaj larmoj lian bruston, per oro broditan.

Kaj al Salko tio estis agrabla, kaj li mem ne sciis, kial ili ankoraŭ tiel longe staras. Sed Marta sin levis, kaj tremante kun la tuta korpo, ordigis la tukon kaj ĉapon sur ŝia kapo, kvazaŭ ŝi ne scias kion fari.

Kaj vidinte, ke ŝia patrino ĉirkaŭprenas Salko-n, kaj ke estas oportuna momento, ŝi subite fariĝis decidema kaj malserena:

— Salko, foriru! — ŝi ekkriis, sed tuj ankaŭ eksilentis, ĉar ŝi eĉ mem ektimis sian voĉon. Tiuj vortoj al ŝi ŝajnis tiel kruelaj, ke ŝi ektremis pro ili, sed ŝia gorĝo estis tiom seka kaj kunpremita, ke ŝi ne povis paroli plu.

Nek Salko nek Stana respondis, sed nur disiĝis, kaj Salko timigite kaj mirigite rigardis Marta-n, kvazaŭ al li montriĝus la morto. Kaj Marta ekrigardis lian ŝanĝiĝintan vizaĝon, kaj kiam forta frapo de la vento ekskuis la pordon, ŝi sentis en si ian obstinon kaj furiozecon, ke ŝi ekkriis tra la ploro pro l' ĉagreno kaj kolero:

— Foriru! Via mi estos neniam!

Sed tuj post tio ŝi faliĝis sur la seĝon ĝemante mallaŭte, kvazaŭ ŝi estas mortiginta ion grandan kaj bonan. Kaj Salko faris unu, du paŝojn, kvazaŭ ekfaletis, sed Stana rapide lin kaptis, kaj, ne sciante mem kion ŝi parolas, ŝi komencis krii:

— Ĉio tio estas pro Raŝica! . . . Ŝi volas edziniĝi kun Raŝica — aŭdu min! . . . Li enamiĝis en ŝin. . . Sed, Salko mia! . . . Kio estas al vi? . . . Nu, vidu lin! . . . Trankviliĝu — ŝi ankoraŭ alipripensos! . . . Aĥ! . . .

Sed Salko, kun malklariĝintaj kaj sanĝiĝintaj okuloj, komencis ĵetadi la seĝojn kaj lignojn apud la fajrero, kriante terure:

Tio estas pro la ringludo! . . . Tio estas pro la ringludo! . . . Tio estas pro la ringludo! . . . Tio estas pro la ringludo! — kaj ĉion ĵetadis kaj rompadis en la domo.

— Sed mi ankaŭ povas gajni! . . . Mi ankaŭ partoprenos la ringludon kaj ĵetos la ringon en la nubojn . . . kaj ĝin kaptos ree . . . sur lancon! . . .

Kaj tiel kriante li ĵetis iun grandan ŝtipon en la mezon de la fajro, kaj fajreroj ekflugis ĉiuflanken.

Ĉiuj en la domo ekkriis, kaj Salko komencis serĉi en la mallumo tiun ŝtipon, por denove ĝin ĵetadi. Sed kiam li aŭdis la vekrion de Marta, ke ŝi lin vokas kaj trankviligas, kaj malesperan krion de ŝia malsana patro, li malfermis subite la pordon kaj elkuris en la mallumon kaj venton.

Kaj tia estis la mallumo kaj tia vento, ke li momenton haltis, sed poste li komencis salti trans la murojn kaj arbetaĵojn, nek serĉante vojon nek sentante la batojn en la piedojn kaj koksojn, ankaŭ nek la venton nek grandajn gutojn de la pluvo.

Komence li volis foriri sur la Birdan monteton kaj

trovi la patron kie ajn, kaj ĉiun momenton li havis en la mano jen ponardon, jen pistolon. Sed poste li eĉ mem ne sciis, kion li volis, ĉar al liaj okuloj ĉio aperis, pri kio li pensis, kaj li ne estis certa, ĉu estas ĵus tiel, kiel al li ŝajnas.

Jam apud la unua arbo, kun kiu li karambolis, li ekpensis, ke ĝi estas lia patro, kiu venis subaŭskulteti lian interparolon kun Marta. Sed kiam li sentis la frapon de l' malmola arbo en sian frunton, li ekpensis, ke ĝi estas certe iu lia malamiko. Li ekbatis ĝin per la manoj, ekhakis per ponardo kaj forrapidis furioze.

Kaj ĉiu frapo je muro, ĉiuj grataĵoj de la arbetaĵoj kaj dornoj, — kaj la vento, kiu forportis lian ĉapon, kaj la pluvego, kiu pli multe al li mallumigis la vidon, ĉio lin pensigis, ke tie estas liaj malamikoj, kiuj konsentis por lin ankoraŭ pli ĉagrenigi kaj detrui tute. — — —

— — — — — — — — — — — — — — — —

Li mem ekmiris, kiam fine li sin trovis sur la Birda monteto, sed li ne sciis, ĉu estas ĝuste ĝi, ĉar sur ĝi jam estis Marta kun lia patro, ĉirkaŭprenintaj sin, ĝuste apud tiu ŝtipo kun serpentoformaj piedoj, — kaj ili volis sin kaŝi en la arbetaĵon, kaj ĉiuj arboj kaj arbetaĵoj komencis sin klinadi, por ilin ŝirmi, spite al li.

Kaj la nuboj, ili ankaŭ malleviĝis kaj intermiksiĝis kun la arbetaĵoj, por bari al li la vojon kaj por kaŝi Marta-n. Sed tamen tra tiuj arbetaĵoj kaj tra tiuj nuboj rapidegis ringludanoj, svingante per lancoj kaj ridante al li, ke li ne povas for.

Kaj tiel malantaŭ la arbetaĵo verŝajne estas la edziĝfesto de lia patro, kaj ĉiuj ringludanoj venis al la edziĝfesto de sia plej bona kunulo. Kaj Raŝica rigardetas tiel malantaŭ la arbetaĵo, en ringludana vesto, — kaj kie ajn li ekmoviĝas, aperas ankaŭ Marta apud li, kaj ili bruligas

sur la arbetaĵoj la kandeletojn, kiuj tuj estingiĝas. Sed li, la ringludanoj kaj Marta, bruligas ĉiam novajn . . . Kaj ĉiuj ridas, ridegas, kaj la nigrulo ĉevalblekas, fosas kaj frapas per la piedoj, kvazaŭ ĝi lin vokas. Sed li neniamaniere povas for pro la arbetaĵoj, arboj kaj nuboj, kiuj viciĝis antaŭ li.

— Sed mi ankaŭ volas esti inter ili kaj piki ilin per lanco, — diris Salko kaj al li ŝajnis, ke oni krias, sed ne li, sed kvazaŭ ekkriis iu alia apud li. Kaj li vokis tiun alian, ke li helpu al li, disigi tiujn nubojn kaj arbetaĵojn, sed li ankaŭ ne volis al li helpi.

Kaj kiam la tutaj amasoj da arboj, nuboj kaj arbetaĵoj komencis ridi kaj kapti liajn manojn, piedojn kaj grati liajn vangojn, nur por ke li ne iru al tiu ringludana edziĝfesto, — terura furiozeco ekbolis en liaj vejnoj. Li ektiris la ponardon el la zono kaj komencis haki ĉion antaŭ si, sed la ringludanoj kune kun Marta kaj Raŝica foriris des pli malproksimen, ju pli li proksimiĝis al ili.

— Hu — h-u-u! . . . muĝis kaj krakis la vento tra la Birda monteto, kaj Salko rompadis kaj detruadis falante trans malnovaj tomboj, en sia bela vesto, ornamita per arĝentaj kaj orumitaj ŝnuroj.

Aroj da timigitaj birdoj sin levis en la mallumon, frapetante per la flugiloj kaj pepante timigite kaj malĝoje.

Grandaj gutoj de l' unua aŭtuna pluvo muĝis strange tra la branĉoj de l' kverkoj, falante sur la malnovajn surtombajn tabulojn.

— Atendu, Marta — mi ankaŭ estas ringludano! . . . Vi vidos min ludanta kaj la ringon fluganta aeren. — Nur ke mi forigu ĉi tiun arbetaĵon — kaj ĉi tiujn nubojn — kaj ĉi tiujn mortintojn, kiuj antaŭ mi renversas tiujn grandajn tabulojn. . . Patro . . . ej! . . . Mar-ta-a-a! . . .

— Hu-u-u, h-u-u-u! . . . muĝis kaj rompadis la vento tra la arboj kaj arbetaĵoj, kaj nigraj aroj da timigitaj birdoj leviĝadis kaj malleviĝadis tien kaj reen, frapetante per la flugiloj kaj pepante malĝoje.

## VI.

Kaj de tiu tago oni ne plu aŭdis pri Salko, nek pri la nigrulo de Raŝica, kiu ankaŭ tiun nokton malaperis.

Tamen kelkaj diris, ke ili lin vidis rajdi sur ĉevalo sur la kampo, kaj ke li estas maldika kaj nigra, — sed aliaj diris, ke li tiam estis en iuj malproksimaj vilaĝoj, sen la nigrulo, sed ke ili renkontis lin portanta ujojn plenajn de aveno al ĝi. Iuj eĉ diris, ke ili lin vidis nokte ĉirkaŭ la domo de Marta kaj la kastelo de lia patro, — kaj la urbanoj rakontis, ke li samtempe estis sur la kurejo de l' ringludo kaj ke li saltis tien kaj reen kun lanco en la mano.

Tial oni kredis al neniu kaj oni ne povis sciiĝi pri la ĝusta vero.

Multaj diris eĉ tion, ke Salko jam mortis aŭ sin mortigis ie kaj fantomiĝis, ĉar alie li ne povus esti samtempe en kelkaj lokoj.

Kaj tiel dum kelkaj tagoj oni parolis pri nenio alia krom pri Salko Crnoŝija, kaj precipe en Begluk.

Kaj kiam Raŝica kaj Marta geedziĝis, kaj Salko ankoraŭ ne ĉeestis, ekribelis la tuta vilaĝo. Ili serĉis lin ĉie, sed ne trovis.

Ili lin serĉis en kavoj kaj fosoj, en la rivero kaj monto, sed vane. Ĉio ribelis, kaj nur Raŝica, Marta kaj Stana silentis. Iliaj vizaĝoj flaviĝis kaj griziĝis pro iu sekreta sufero, sed iliaj buŝoj estis kvazaŭ sigelitaj; ili nur silentis kaj diris, ke ili ne scias pri li.

Komence sekrete oni flustris, sed poste oni komencis

laŭte paroli, ke estas kulpa neniu alia krom la sorĉistino Stana. Ŝi ja certe havis kaŭzon por forigi Salko-n, ĉar kiel alie povus okazi la miraklo, ke maljuna Raŝica edziĝis kun ŝia Marta. Oni sciis ankaŭ tion, ke antaŭ tiom da jaroj Raŝica volis edziĝi ĝuste kun Stana, — kaj ankaŭ aliajn aferojn oni menciis, kaj ili fine konsentis pri tio, ke Stana devas scii pri Salko kaj nur ŝi.

Kaj ili plej multe ribelis depost la edziĝfesta nokto de Raŝica. Tiun nokton io tra la vilaĝo kuris kaj kriegis tiel terure, kaj neniu riskis ekrigardi por vidi, kio tio estas. Tra la tuta tondrado, pluvego kaj muĝego de la tempesto de la okcidento, oni povis aŭdi homan kriadon kaj kuron de ĉevalo, preskaŭ la tutan edziĝfestan nokton de Marta. Sed tiu kriado estis tiel simila al homa voĉo, ke la Beglukanoj certe kredis, ke Salko fantomiĝis kaj nun rajdas sur la nigrulo kaj timigas trankvilajn homojn.

— Sed kiu lin mortigis kaj pro kio? Kaj kial Raŝica serĉas nek Salko-n nek la nigrulon, kaj kial Stana plu eĉ ne eliras el sia domo?

Pli kuraĝaj iris armitaj ĉirkaŭ la kastelo de Raŝica kaj la domo de Stana por ion vidi, sed ili ne vidis, kion ili esperis vidi.

Sed unu nokton ili vidis iun aperaĵon strange vestitan, iranta antaŭ la pordo de Stana, kaj tiam ili aŭdis, ke io krakis kaj ekgrincis. Tamen alproksimiĝi ili ne kuraĝis, sed tiris unu la alian je la maniko kaj timtremis, rigardante el malproksime densan fumon leviĝanta el la domo de Stana en tiu eksterordinara tempo.

— Kaj kial estis tiu fumo kaj tiu krako en la malluma noktotempo, kaj tiu aperaĵo antaŭ la domo de la sorĉistino? — Ili demandis matene en la vilaĝo unu la alian — kaj en momento kolektiĝis amaso da Beglukanoj sur Podiĉ. Kaj ĝi estis iu granda ebenaĵo sur iu

pli supra loko kaj meze de la vilaĝo, kie dum Kristnasko oni dancis rondodancon, kaj kie dum ĉiuj pli grandaj okazintaĵoj oni kolektiĝis al kunvenoj.

Post tiom da malserenaj kaj pluvemaj tagoj ree sereniĝis kaj tagiĝis la klara tago, nek aŭtuna nek somera. Varmaj ventetoj blovetis de diversaj flankoj kaj facile levadis en la puran aeron flavetan maizvilaron aŭ flugigis fadenaron de blanka araneaĵo. Kaj la suno milde brilis, kvazaŭ ĝi verŝas trankvilon kaj feliĉon sur la teron, kiu sin preparis por ripozi. —

La velkinta herbaro sur Podiĉ denove verdiĝis de la pluvo kaj radioj sunaj, sed multaj piedoj komencis ĝin piedpremi, ne kompatante tiun junan herbetaron, kiu antaŭ vintraj frostoj vekiĝis je mallonga vivo.

Senĉese kunvenadis sur Podiĉ novaj personoj, por vidi, kion ĉi tie oni planas. Oni bruis sufiĉe, sed sen kriado, ĉar ĉiuj estis timigitaj kaj malĝojaj kaj meditis, kion oni povus fari. Oni parolis pri neniu alia, sed nur pri Salko.

Kaj ĉiuj rememoris, kiel li estis bona kaj bela, kaj ili komencis paroli unu post la alia:

— Neniam li al iu diris kolerigan vorton!

— Kaj li faris ĉion bezonan — kaj ĉion, kion al li oni diris!

— Kaj li ĉiam parolis tiel milde!

— Neniu vidis alian tiel mirindan junulon!

— Li ja estis junulino kaj ne junulo, — kaj kial ili lin mortigis?

— Demandu Stana-n, kial? Ĉion ĉi tiu maljuna sorĉistino interplektis!

— Nu ni iru por demandi ŝin, ĉar ŝi sola devas scii, kio estas kun li!

— Ni ja demandis ŝin, sed ŝi diras, ke ŝi ne scias!

— Oni devas ŝin devigi, ke ŝi parolu, — ni iru ĉiuj al ŝi. Kaj kunportu bastonojn, kaj se ŝi ne volas diri ...

— Ni kunportu bastonojn . . . nature!

— Ankaŭ premilon!

— Vi estas pravaj! Sen ĝi eĉ nun ŝi diros nenion!

— Ankaŭ ŝnuron . . . kaj ni ŝin fumaĵos per pajlo ... Sed nun maljuna Vukelja, kiu sidis sur malalta ŝtono, levis ambaŭ manojn kiel du ŝtonojn. Kaj ĉiuj ĉirkaŭ li eksilentis, ĉar tio estis signo, ke li ion diros.

Oni diris, ke Vukelja estas pli ol centjara, kaj li devis scii, kaj li ankaŭ sciis, pli ol la ceteraj. Tial ili lin ankaŭ demandis en malfacilaj cirkonstancoj, por ke li ilin konsilu, kaj neniam li ilin konsilis malprave: kiel li diradis tiel estis, kaj li neniam eraris.

Li ankoraŭ portis la harligon kaj altan ĉapon, kaj tiu harligo rigardetis de sub ĝi kvazaŭ mallonga glacipendaĵo, kaj kelkaj bukloj, ankaŭ akraj kaj blankaj kiel la frosto. Okuloj liaj profunde enfalis, li ne plu havis unu denton, kaj kapo lia pro la maljuneco skuiĝis.

Kaj kiam ĉio eksilentis, mallevis Vukelja la tremantajn manojn sur siajn genuojn kaj ekparolis muĝetante, — kiel persono, kiu ne plu havas dentojn. Li parolis malrapide, kaj tial estis ĉirkaŭ li tiel trankvile, ke aŭdiĝis eĉ kvieta susuro de la vento.

— Ne faru tion, homoj kaj fratoj, — timu Dion! . . . Ne faru! nek per bastono nek per premilo, kaj ne bruligu pajlon, kvazaŭ vi senviligus la porkidon. . .

— Kiel tio, kiel nia avo? — Kiel tio? Kaj kiel ni tiam sciiĝos? Kaj kiu alia estas kulpa, se ne ŝi?

— Eble ŝi estas senkulpa kaj scias nenion, kaj ne kulpigu vian animon . . . Sed mi al vi rakontos, kion mi travivis en antikva tempo, kaj en miaj junaj tagoj . . . Nun estas ĉirkaŭ la okdeka jaro de tiam, kaj tiam mi estis

pli ol dudekjara, kaj mi ankoraŭ ĉion bone rememoras . . . Mi havis onklinon; ŝin oni nomis Ŝtirka, ĝuste tial, ĉar ŝi havis dektri infanojn. Oni nomis ŝin Ŝtirka ŝerce. Ili loĝis kun ni, kaj ĉiun tagon malaperis peco de nia komercaĵo, aŭ el la domo aŭ de la sekigejo, kaj poste tiun komercaĵon oni trovis ĉe ŝiaj infanoj. Kaj multfoje pro tio okazis en la najbareco malkonsento, kaj ŝi ĉiam diris: „Ne, mi tion ne faris!“ Unu tagon malaperis el nia domo tuta volvaĵo de drapo. Ne estas ŝerco — ĝi estis pli ol dudek arŝinojn longa! Nia patro ne estis hejme, ĉar li laboris en Sinj. Tie oni konstruis domon, kaj li estis masonisto kaj iris ĉien por labori, kien lin oni invitis . . . Kaj li tiel alkutimiĝis drinki kaj ĉion doni por la vino. Vane estis lia laboro, ĉar li ankoraŭ faris ŝuldojn, anstataŭ ion alporti hejmen. Kaj mia onklo estis bona kaj ŝparema homo, kiel ankaŭ necese al li estis pro tiom da infanoj . . . Do, fratoj miaj, — kiam malaperis tiu volvaĵo de drapo, ni ĉiuj unuvoĉe diris: Ĝin ŝtelis certe nur Ŝtirka! — ĉar ĉiu en la najbareco kredis, ke por ŝi estas necese ŝteli, kvankam ne pro si, sed almenaŭ pro siaj infanoj. Sed ŝi ankaŭ nun diris: „Ne, mi tion ne faris!“ — Sed ŝi tiun fojon ne sukcesis. La tuta najbararo atakis ŝin, — ĉar al ĝi tedis. Kaj tial ili volis, ke pri ŝi oni juĝu laŭ antikva moro. Kaj antikva moro estis la jena: Oni boligis kaldronon da akvo kaj en tiun bolantan akvon ĵetis pecon da fero, kaj se al la juĝoto nenio okazos kaj se li ne vekrias, — tiam li estas senkulpa, se li sin bruligas — li estas kulpa! . . . Nur, nature, oni devas antaŭ tio inviti Dion ke li helpu, por montri la juston. Kaj kion vi vidos, homoj miaj! Oni boligis kaldronon da akvo, ĵetis en ĝi ardan feron, kaj altiris Ŝtirka-n, ke ŝi eltiru ĝin. Kaj kiam ŝi vidis, ke ŝi devos fari tion, ŝi subakvigis la manon, elprenis la feron

kaj ĵetis ĝin sur la teron . . . kaj la mano restis netuŝita! Ŝi nek kriis nek vekriis, kaj ni ĉiuj kun mallevitaj kapoj foriris, petante unu post la alia de ŝi pardonon. Kaj ŝi silentis, malĝoje sintenis kaj nenion respondadis . . . Kaj kion vi vidos, homoj miaj! La sekvantan tagon matene venis mia patro de la laboro kaj, kiam ni al li diris, kio okazis, li diris al ni, ke li ŝtele forportis la drapon kaj deponis ĝin ĉe iu komercisto, ĉar li bezonis la monon, por pagi al la trinkejestro sian ŝuldon. Kaj vere li poste reaĉetis kaj alportis tiun drapon hejmen. Kaj de tiam neniu diris eĉ unu vorton al Ŝtirka, ankaŭ se io malaperis.

Ĉiuj silentis kaj neniu parolis: tiel ili ekmiris.

Nur iu granda korvo transflugis super tiu amaso kaj dufoje ekgrakis obstuze.

— Kiel tio al vi ŝajnas — ha? — demandis Vukelja, kiam ili al li nenion respondis.

Kaj bone ili nun lin komprenis, kaj ekaŭdiĝis ĝojaj ekkrioj kaj aproboj de ĉiuj, kaj plej de Juriŝa kaj Gare.

— Ni iru, ni iru ĉiuj!

— Kaj ŝi elprenu la feron, se ŝi ne volas diri!

— Mi kunportos kaldronon . . .

— Kaj mi iras peti de forĝisto feron — novan!

— Kaj lignoj? . . .

— Lignojn oni ne bezonas alporti — lignoj estos ankaŭ ĉe ŝi!

Kaj ili rapide ekiris, kaj infanoj kuris antaŭ ĉiuj. Sed post ili ekrapidis iliaj patrinoj kaj komencis kapti la infanojn, por ke ilin la sorĉistino ne mortpafu. Sed la plej multaj forkuris, por denove reveni en oportuna momento.

Post mallonge granda amaso de Beglukanoj kaj Beglukaninoj sin trovis antaŭ la domo de Stana kun tiom da krio kaj bruo, ke eĉ ŝi elkuris antaŭ la domon, antaŭ-

sentante ion malbonan. Kaj tion oni povis vidi ankaŭ sur ŝia ŝanĝiĝinta vizaĝo, kiu montris grandan timon. Kaj anstataŭ ke ili tiun vizaĝon kompatis, la amaso sur ĝi legis la konfeson pri la kulpo kaj ŝin kaptis tuj multaj manoj, por ke ŝi ne forkuru. Kaj la aliaj jam pendigis la kaldronon kun la akvo kaj varmigis la fajlilon en la fajro.

Sed multaj paroloj tie nun ne estis, kiel oni povus pensi, dum tiel grava okazantaĵo.

Granda rondo de Beglukanoj, kiu ĉirkaŭis Stana-n, Vukelja-n kaj pli maljunajn homojn el la vilaĝo, silentis, sciante, ke nun la sorĉistino ne povas de ili forkuri kaj ke ŝi estas inter justaj juĝantoj. Ankaŭ pro tio, ĉar ĉion oni faros en la nomo de Dio, kaj ĉar ili devas esti trankvilaj kvazaŭ en la preĝejo. Sed krom tio ili atendis ankoraŭ eĉ miraklon, kiun ili, eble, vidos per siaj okuloj.

En la mezo de tiu mallarĝa kaj sortfatala rondo oni faris ĉiam la samajn demandojn kaj aŭdis la samajn respondojn — kaj tiujn demandojn oni ripetis nur tial, por ke oni plenigu la tempon, ĝis bolos la akvo kaj ardiĝos la fero.

— Diru, kio estas kun Salko?

— Mi ne scias — ho, mi mizera!

— Vi devas scii, kie li estas, kaj diru — aŭ vi eltiros la feron!

— Mi ne scias, mi mizera, eĉ se vi min mortigos!

— Diru, kie estas Salko, aŭ vi mortos hodiaŭ!

— Vi povas eĉ miajn okulojn elfosi, sed mi ne scias!

Kaj similaj demandoj kaj similaj respondoj centfoje, ĝis oni ekkriis ĉe la pordo:

— La akvo bolas, kaj la fero ruĝiĝis! Ĉu ni alportu!

— Atendu ankoraŭ momenton! — Ĉu vi diros?

— — — — — — — — — — — — — — — — —

— Alportu! — diris Vukelja akre.

— Alportu, alportu! — ekkriis ankaŭ la aliaj.

El la domo aŭdiĝis malĝoja kaj tremanta vekrio de malsana Ilija, kaj ĉiuj eksilentis kaj glaciaj timtremoj trairis iliajn korpojn.

— Timu Dion, homoj — kion vi intencas? Stana mia! . . . Sta-na! . . . vokis kun malforta voĉo la senfortulo.

Trankvileco kaj nedecideco ekregis en la amaso, sed nur momenton.

Kaj kiam Stana vidis ilin rapide portantaj la kaldronon kaj la feron, kiu eĉ en la sunlumo estis tre ruĝa, ŝi saltis kaj ekkriis laŭte:

— Mi ne scias, kie estas Salko, sed mi diros al vi ĉion alian, kion mi scias! . . . Salko freneziĝis, sed mi ne estas kulpa! — kaj ŝi komencis malespere taŭzi siajn malmultajn grizajn harojn, kiuj al ŝi ankoraŭ restis.

— Haha, haha, ŝi ekparolis! — ekkriis ĉiuj kaj malfermis la buŝojn por pli bone aŭdi.

— Kaj la kaldronon kaj la feron metu denove sur la fajron! — diris la juĝantoj.

— Demandu, demandu! Ĉu vi vidas, ke ŝi scias! — diris multaj el la rondo.

Milda venteto ekfluis super la kapoj kaj ree haltis, kaj la suno ekbrilis ĝoje kaj ripozeme super la tuta regiono, super Begluk kaj super tiu trankvila, sed terura amaso.

— Li do freneziĝis? Kaj kiel vi tion scias?

— Li estis ĉe mi pasintan nokton . . .

— Vero estas, vero! Veron ŝi diras! — diris iuj.

— Diru, diru!

— Kaj li estis terure stranga — mi preskaŭ mortis pro timo! Unuamomente mi lin eĉ ne rekonis, tiel li estas maldika kaj distaŭzita. Li estis ornaminta sin per ĉio,

kion li povis pendigi sur sin — kaj parolas ĉion . . . same kiel parolas freneza homo!

— Kaj tiam? . . . Parolu! — diris la juĝantoj ree.

— Kaj tiam? . . . Parolu! — ripetis multaj voĉoj de Beglukanoj kiel eĥo kaj sin premis pli kaj pli proksimen ĉirkaŭ ili.

— Tiam li rompis mian pordon, ĉar mi ne riskis malfermi. Mi bruligis al li la fajron, ĉar li tremis, kaj mi pensis, ke tio estas pro la malvarmo.

— Veron ŝi parolas! Ni aŭdis la krakon kaj vidis la fumon . . .

— Mi lin ĉiam amis kiel . . .

— Nu, silentu! — nur ne parolu tion, sed diru! — interrompis ŝin maljuna Vukelja.

— Kaj li parolis ĉion — kaj mi nenion povis kompreni, kion li parolis, mi nur timis . . . Mi preskaŭ mortis!

— Ne mensogu, sorĉistino maljuna!

— Sed diru al ni, kial li freneziĝis?

— Kaj kion vi al li faris?

— Kaj kial li ĝuste al vi venis?

— Diru! . . . Parolu! . . . ili kriis pli kaj pli laŭte ĉirkaŭ ŝi, etendante la brakojn kaj spasme kuntirante la fingrojn, ĝuste antaŭ ŝia maljuna kaj senmova vango. Stana silentis kaj subite ekrigardis timigite, kaj tiam ŝi sidiĝis, klinis la kapon sur la genuojn kaj ekploris tiel forte, ke ĉiuj eksilentis kaj plu eĉ unu vorton ne diris. Kaj en tiu trankvilo denove el la domo ekaŭdiĝis la voĉo de la senfortulo, kvazaŭ bleko de malgranda ŝafido, kiam ĝin oni disigas de la brutaro. Sed neniu ekridis, unu virino eĉ diris plore:

— Kion ni faras, fratoj? Peko estas turmenti malfeliĉajn homojn!

Sed maljuna Vukelja etendis sian malgrasan brakon,

kiel aglo siajn ungegojn, kaj, levante la kapon de Stana, diris al ŝi pli milde:

— Ni vidas, ke vi scias ĉion. Diru la veron, kaj al vi okazos nenio. — Kaj kial Salko freneziĝis? Parolu! Ni al vi kredos ĉion, kion vi diros!

Tiam sin levis Stana kaj komencis sekigi la larmojn per la malgrasa kaj tremanta mano.

— Mi ne estas sorĉistino kaj mi deziras al neniu ion malbonan. Kaj nun mi plu ne timas bolantan akvon, nek la feron nek vin, — sed mi same diros la efektivan veron kaj ĉion, kion mi scias. Tiel Dio al mi helpu!

Kaj ŝi frapis sin sur la maljunan maldikan bruston, kiu spiregis de ekscito, kaj okuloj ŝiaj brilis. Post tiom da silento kaj sufero amasiĝis en ŝi tiom da nediritaj sentoj kaj pensoj, kiuj nun volis eliĝi.

La Beglukanoj unue komencis silentigi unu la alian, kaj tiam tute eksilentis, por pli bone aŭdi la paroladon de Stana. Kaj dum ŝi parolis, aŭdiĝis ofte ekkrioj de miro, sed sur ĉiuj vizaĝoj oni vidis, ke ili kredas, kion ŝi parolas. Kaj ŝi al ili parolis ĉion, kion ŝi sciis, kaj tiel, kiel ŝi komprenis pri la amo inter Salko kaj Marta, ankaŭ Marta kaj Raŝica: ĉion de la komenco ĝis fino, ĉar Marta al ŝi ĉion rakontis. Ŝi al ili diris ankaŭ, kio okazis, kiam Salko la lastan vesperon estis ĉe ŝi kaj Marta, kaj kiel li forrapidis en la tempeston, — kaj rakontis ree pri lia stranga reveno en ŝian domon la pasintan nokton.

Multaj virinoj kaj junulinoj komencis plori, kaj viroj enpensiĝe mallevis la kapojn. Kaj vere pri tia amo ili neniam eĉ aŭdis.

Kaj kiam Stana ekvidis, ke ŝia parolado kortuŝis ĉiujn, ŝi volis al ili ankoraŭ pli detale klarigi, kiel ĉio okazis. Sed intertempe per rapida paŝo kaj tuta ŝvita venis Marta al la amaso kaj komencis sin ŝovi, por pli antaŭe vidi la patrinon.

Ŝi jam estis aŭdinta pri la decido de la vilaĝo kaj la kunveno, kaj ĉar Raŝica ne estis hejme, ŝi ekkuris por defendi sian patrinon. Ŝi des pli rapidis, ju pli ŝi en tiu momento pripensis: „Pri la malfeliĉo de Salko estas kulpa neniu, kaj plej malmulte mia patrino. Se iu estas kulpa, — tiu estas mi!“ Kaj pro tio ŝi rapidis tutforte por ŝirmi la patrinon, eĉ per sia vivo. Sed kiam ŝi alvenis kaj vidis bonajn kaj kortuŝitajn vizaĝojn de l' Beglukanoj kaj sian patrinon meze de la grupo rakontanta ion al ili, ŝi ekmiris tre kaj haltis.

Iuj foriĝis kaj lasis ŝin al la patrino, kaj Marta ekkuris tuj al ŝi, ĉirkaŭprenis ŝin kaj ekrigardis ĝoje ĉirkaŭ si.

Ŝi ŝajnis ankoraŭ pli bela ol antaŭe, kaj ĉiuj rigardoj haltis sur ŝi: ŝia belegeco admirigis ĉiujn.

Sed maljuna Vukelja malsereniĝis kaj, sin apogante sur la bastono, komencis malrapide sin levi. Kaj kiam li sin levis, sin levis ankaŭ iuj aliaj maljunuloj, kiuj sidis apud li.

La tuta amaso ekbruis kaj ree eksilentis subite, ĉar oni vidis, ke Vukelja ree ion diros. Kaj fakte, li levis iomete la bastonon kaj diris:

— Ni aŭdis, homoj, ke Stana estas senkulpa. Al mi tiel ŝajnas, kaj mi vidas, ke vi ankaŭ tiel pensas. . . Sed ĉu estas senkulpa ankaŭ ĉi tiu ĉi tie? — kaj li montris per la dika fingro de l' dekstra mano al Marta.

Kaj kiam li ricevis neniun respondon, li diris denove:

— Homoj, ne estas ŝerco! Vian plej taŭgan junulon trafis tia malfeliĉo, ke pli bone estus, se li estus mortinta. Kaj kial? Ĉar tiu ĉi ĉi tie lin forĵetis kaj ne volis kun li edziniĝi! Ŝi ne volis tian junulon, — kaj pro kiu? Pro lia patro . . . maljuna Raŝica! . . . pripensu kaj diru!

Post tiuj vortoj ĉiuj denove fiksis siajn rigardojn al

Marta, kvazaŭ ili ion atendas, sed ili vidis nur staturon kaj vizaĝon de nedirebla beleco, kaj el ĝi brilis la feliĉo.

Ŝi komprenis la vortojn de Vukelja, sed ŝi ne komprenis, kion li de ŝi deziras. Nun ja ĉio estas finita, kaj ŝi estas laŭleĝa edzino de Raŝica, kaj neniu havas rajton krom li, juĝi pri ŝi: li nun estas ŝia sola mastro.

Sed kiam ŝi sentis ĉiujn rigardojn sur si kaj vidis, ke ili atendas, kion ŝi diros, ŝi prenis milde Vukelja-n ĉe la ŝultro:

— Honoron al vi, maljunulo, sed vi ne parolas prave! Kion mi povis fari, kiam mi ekamis Raŝica-n pli multe ol Salko-n? Kiu povas ordoni al mi — ankaŭ al iu alia — kiun mi amu, kiam tion eĉ ni mem ne povas al ni ordoni.

Ĉiuj ekmiris, kion diris Marta, ĉar tiajn vortojn ili ankoraŭ neniam aŭdis. Kaj nun jen ili aŭdas ilin el virina buŝo. Ili jam sciis, ke Marta ne estis kiel aliaj junulinoj, sed tamen ili ekmiris.

Tial eĉ Vukelja rigardis ŝin kun malfermita buŝo kaj malserene kaj eĉ ne respondis.

— Kaj vi volus, ke mi estus trompinta Salko-n kaj veninta en lian domon, pli amante Raŝica-n ol lin... Se mi tion estus farinta, mi estus aginta centfoje pli malbone!

— Nature!... Ŝi estas prava!... Ŝi estas virino!... — aŭdiĝis voĉoj el la amaso.

— Kvankam mi sciis, ke mi estas al Salko kara, mi ne povis scii, ke al li tio okazos, kio al li okazis, — kaj mi lin bedaŭras pli ol ĉiu el vi...

Momenton ŝi enpensiĝis kaj subite daŭrigis:

— Kaj se mi estus sciinta, kio okazos al Salko, mi ankaŭ ne estus edziniĝinta kun Raŝica!

— Bone ŝi parolas! Pli bone estus, se ĉiuj junulinoj estus tiaj! — diris la Beglukanoj.

— Nun mi ne estas kulpa, — sed, se mi estus edzin-

iĝinta kun li — mi lin treege estus trompinta kaj devus trompadi kaj mensogi ĉiun tagon... Kaj mi ne scias trompadi kaj mensogi, — ŝi diris ree, kaj sur ŝia vizaĝo ekbrilis la vero kaj amo.

— Brave, Marta! — ekkriis iuj virinoj — bone vi faris!

Sed Vukelja kolere frapis per sia bastono la teron kaj foriris, kiam li aŭdis de ĉiuj, ke ili pravigas Marta-n, kaj malpravigas lin, jen unuafoje.

Ankoraŭ unu korvo transflugis super ili silente, nur ĝiaj flugiloj sortfatale muĝis kaj malaperis en trankvila blueta aero.

Kaj Beglukanoj kaj Beglukaninoj ekrigardis sin ĝoje kaj estis gajaj, kvazaŭ ili estas eksciintaj iun agrablan novaĵon.

Ili sciis, ke, de kiam oni scias, en Cetina la junulinoj edziniĝas laŭ ordono de siaj gepatroj, kaj ke multaj edzinoj ne amas siajn edzojn. Kaj ili sciis ankaŭ tion, ke la junulinoj eĉ ne kontraŭstaras por edziniĝi kun la nekarulo — kaj pro tio, ĉar ne estas moro, ke la junulino parolas pri la amo, kaj ke ŝi ne rajtas montri, ke iu junulo estas al ŝi kara.

Tial ili estis mirigitaj, aŭdinte el virina buŝo tian paroladon, sed al ili ĉiuj estis agrable, ke ili aŭdis tion de ŝi. Nur Vukelja kaj ankoraŭ iuj maljunuloj diris, ke ne decas, antaŭ la tuta vilaĝo, al la edzinoj tiel paroli, — kaj ke ili pravigis Marta, ĉar ili timas Raŝica-n.

Kaj la Beglukanoj disiris tute alie, ol ili kunvenis: ili venis al la domo de Stana kiel silenta tempesta nubo, plena de la hajlo kaj fulmoj, kaj nun ili disiris kiel „ŝafidoj" sur la klara printempa ĉielo. Oni povas diri, ke la amo per sia milda spireto ekkaresis ĉiujn, krom tiujn, kiuj vivas en maljuna korpo kaj malnovaj pensoj.

Tamen ili ne ĉesis, pro tio bedaŭri Salko-n, — sed ili neniun kulpigis krom lian malbonan sorton.

Juriŝa kaj Gare antaŭe estis la plej grandaj malamikoj al Marta kaj ŝia patrino, ĉar ili tre amis sian kunulon. Sed nun, forirante, Juriŝa ne povis persisti.

— Nek povas esti ĉiu malfeliĉa nek ĉiu feliĉa, kaj al iu devas okazi eĉ malfeliĉo!

Kaj Gare enpensiĝis, kvazaŭ li ion serĉas en sia menso, kaj respondis vigle:

— Ĉu vi scias, kio estas! Fraŭlina amo estas simila al la ringludo. Du ne povas ĝin gajni. Kiu estas pli kuraĝa, tiu estas ankaŭ pli feliĉa, kaj tiel okazas: kiel la ringludo, tiel ankaŭ la fraŭlino . . .

— Ĝuste tiel, — kaj ni ne bezonas malĝoji pro tio, ĉar du ne povas posedi la saman aĵon!

— — — — — — — — — — — — — — — —

Tutan tiun tagon brilis la suno ĝoje kaj milde super Begluk kaj la tuta regiono, kaj la homoj revenis trankvilaj kaj kontentaj al siaj ĉiutagaj laboroj. Nur Raŝica ne estis en Begluk: li serĉis sian Salko-n en solecaj lokoj de malproksimaj vilaĝoj kaj neniajn konsoligajn vortojn li aŭdis.

## VII.

Dum tiu serĉado fariĝis denove ardega, flamanta somero, kaj kun ĝi ankaŭ la monato Aŭgusto, kiam tra blueta nebuleto kaj nuboj el la polvo komencas moviĝi multkoloraj amasoj al la mirakliga Virgulino kaj la kurejo de la ringludo.

Salko-n en Cetina-regiono jam oni forgesis, kaj oni parolis nur pri tiuj solenaj tagoj: pri la dekkvina kaj dekoka de Aŭgusto.

Vilaĝoj kaj la urbo sin ornamis per novaj vestoj,

kiujn oni ventumis kaj preparis; oni nutris la ĉevalojn kaj briligis la armilaron, ĉar dum tiuj tagoj ĉiu estas en edziĝfesta vesto, kaj tiajn tagojn ne havas la aliaj regionoj: tagojn sanktajn kaj heroecajn.

Unu post la alia varma kaj sufokiga tago pasis, kaj en la naskiĝtago de la reĝo amasiĝis miloj de la popolo ĉirkaŭ la kurejo, por vidi la ringludon. — Iuj la unuan, kaj iuj eĉ la tridekan fojon — sed ĉiuj atendis ĝoje kaj maltrankvile la komencon de la ludo, ĉar tian belecon vi neniam povas plenrigardi.

Kaj ĉi tiun jaron ŝajne estis pli multe da popolo ol pasintan jaron.

Oni parolis, ke ree vetkuros Raŝica kaj Alaj-heroldo, kaj alvenis eĉ tiuj, kiuj ne intencis veni. Jam de la tagmezo sin ŝovis granda aro el proksimaj kaj malproksimaj regionoj, trans la pontoj, kampoj kaj ĉie, kvazaŭ aroj da formikoj rapidegantaj al peceto de freŝa pano. Eĉ la herbejo ne estis en la Majo pli diverskolora ol ĉi tiu arego da popolo, kiu rebriliĝis en la ardega sunlumo.

Kaj ĉiuj tiuj multaj koloroj, bruo, krio, tumulto kaj kantoj, kaj poste la malproksima muĝo en la urbo kaj ĝojaj sonoj de la ringludana muziko, ebriigis pli ol la suno kaj vino. La penso pri tiu longa vico da jaroj, — dum kiuj same tiel kunvenadis iliaj malnovaj herooj, — kaj la memoro pri tiuj vundoj kaj mortintaj kapoj en pasintaj epokoj, tremigis iliajn korpojn, kiuj alie ligniĝus pro ĉiutagaj zorgoj.

Kaj precipe, kiam devis sin kompari du koroj kaj du fortoj pri la venko kaj gloro, neniu el tiuj miloj pensis, ke tiuj batalantoj estas idoj de la sama lando: unu defendas la patrujon, la alia estas ĝia malamiko, — kaj tial fine estas ĉiuj koroj por la gajninto, ĉar tiu povis

esti nur „nia“. Kiu estas venkita, certe estas „malamiko“, ĉar mem Dio estas kun tiuj, kiuj superas, kaj iliaflanke estas la justo.

Kaj la malamiko devas esti: ĉio kio estis, volis nin pereigi, kaj ĉion kio restis, savis la kuraĝeco kaj forto. Sed ĉiuj, kiuj venkas, venkis nur tion, kio nin ligas por enkatenigi la liberon kaj forton, kaj savis nin tiuj, kiuj disverŝis sian kaj fremdan sangon. Ĉar ĉiun fojon, kiam oni disverŝis tiun sangon, fariĝis pli bone ... Tiel ne meditis, sed tiel sentis tiuj sennombraj amasoj atendante la kuron.

Pro tio tremis tiuj amasoj dum la kuro de ĉiu ringludano, ĉar ĝi al ili estis ne la batalo de unu, sed la atako de l' tuta taĉmento kontraŭ sennombra militistaro malamika. Kaj kiam iu ringludano trafis en la mezon, tiu lanco trapikis dukon de malamika militistaro, kaj ne feran ringon.

Sed kiam sin trovas du herooj, kiuj neniam cedos unu antaŭ la alia — ili ne scias, kiu estas „nia“, kaj tiam la koroj tremas, kaj la vizaĝoj paliĝas.

Ĉi tiu maltrankvilo estas tiom agrabla, ke oni forgesas ĉiujn hejmajn zorgojn, kaj ĉiu koro kaj ĉiu penso flugas al grandaj aferoj, komunaj por ĉiuj. —

Rikoltantinoj postlasis la maizojn, kaj falĉantoj la herbejojn; la patrinoj kunportis la infanojn kaj maljunuloj forlasis sidejojn siajn por vidi, kiu ĉi tiun fojon restos venkinto kaj kiu estas el ili du „nia“: Raŝica aŭ Alajheroldo.

Beglukanoj kaj la pli proksimaj al ili sciis, ke Raŝica ne vetkuros, ĉar li ankoraŭ ĉiam serĉas Salko-n, sed el pli malproksimaj lokoj alvenis ĉiuj, por vidi ankaŭ alian mirindaĵon. Tio, kion ili pasintan jaron vidis tiel ilin kortuŝis, ke ili tutan jaron maltrankvile vivis atend-

ante la ringludon. Kaj tiu al ili kara ringludo fariĝis ankoraŭ pli kara pro Raŝica kaj Alaj-heroldo, ĉar heroeca ludo estas bela nur kiam estas la herooj.

. . . Kaj komencis iri inter ili la brilanta ringludana taĉmento, kvazaŭ aro de junaj reĝidoj, rajdante fiere apud batalemaj sonoj de la muziko: la tero skuiĝis, kaj la armilaro kaj arĝentplatoj tintis.

La popolo haltigis la spiradon kaj per la okuloj nombris la ringludanojn, sed kiam ili ne trovis Raŝica-n inter ili, ĉiuj ekspiris profunde kaj ekaŭdiĝis strangaj sonoj el sennombraj gorĝoj. Tio estis voĉoj de malkontenteco kaj kolero.

Mem Alaj-heroldo, rajdante lasta, estis malbonhumora kaj kolera, ĉar al li estas la venko certa kaj ĉar li ne havas kontraŭulon indan al si.

— Ne estas Raŝica ĉi tie!

— Ne!

— Jen, diable!

— Mortigu lin Dio granda!

— Kaj kio al li okazis?

— Lin prenis la diablo — jen kio!

Tiel kriis kaj insultis de ĉiuj flankoj, ankoraŭ eĉ tiam, kiam jam komenciĝis la kuro, tiuj, al kiuj ne penetris la sciigo pri la malfeliĉo, kiu trafis lian filon Salko-n.

Sed apenaŭ traflugis du ringludanoj, kiam, sur la loko, kie oni komencas la kuron, ekaŭdiĝis granda krio, insultoj, rido kaj tia tumulto, ke ĉiuj eksilentis, klinante la kapojn tiuflanken.

Intertempe ili aŭdis rapidan ĉevalan piedfrapadon kaj — sur maldika, nigra ĉevalo aperis tia rajdanto, kian vi eĉ en la sonĝo ne povas ekpensi.

— A-a-a-a . . . A-a-a-a . . . A-a-a-a . . . — Kvazaŭ rapida ondo disvastiĝis obtuze de ambaŭ flankoj de la

kurejo, tiel la stranga aperaĵo rapidegis antaŭ la okuloj.

Sur tiu maldika, nigra ĉevalo rajdis homo ankoraŭ tre juna kaj bela, sed vesto lia estis tre stranga.

Li estis nudpieda, lia kalsono ĉifonita, kaj sur la kamizolo, ankaŭ malnova, saltetis arĝentplatoj, sed ankaŭ multaj aliaj objektoj. Tio estis ĉiuspecaj limakoj teraj kaj maraj, kaj kverkpomoj, diversaj butonoj, multkolora papero, speguletoj, — kaj ĉio alia, kion oni povas trovi sur balaaĵejoj. Kaj sur la kapo li havis grandan hirtan peltĉapon, ornamitan per plumoj ĉirkaŭe, similan al krono de iu sovaĝula reĝo. Tio estis plumoj de meleagro, kokviroj, anasoj, kornikoj, — sed ankaŭ du pavaj plumoj, kaj strange estis, ke en tia kuro ne disiĝis la tuta plumaro.

Kaj en la mano tiu stranga rajdanto portis bastonon, per kiu oni pelas la bovojn, sed tiamaniere, ke tuj oni vidis, ke li decidis, uzi ĝin kiel la ringludano lancon. Kaj vere, kiam li proksimiĝis al la ringo, li levis sian bastonon kaj direktis ĝin ĝuste kiel la ringludano sian lancon.

Miloj da kapoj kun seninterrompe rigardantaj okuloj kaj malfermitaj buŝoj akompanis lin dum lia kuro, kaj la trankvilo estis pli granda, ol kiam pasintan jaron kuris Raŝica kaj Alaj-heroldo. Sole arbaro el la brakoj sin levis kaj klinadis kaj reen, kiel la korpoj fleksiĝis por pli bone vidi tiun strangaĵon.

Kaj ili vidis la bastonon trafluginta la mezon de la ringo kaj ĝin ruliĝinta al la mano de tiu stranga ringludano, sin turmentanta por ree ĵeti la ringon de la bastono aeren. Sed la bastono ne posedis „ofendilon“ kiel la ringludana lanco, kaj la ringo ekflugadis iomete sur la bastono kaj ree frapis malsupren la manon. Kaj tiam tiu homo kvazaŭ furioza eksvingis forte per la

bastono kaj frapis per la piedoj la ĉevalon, kaj forrajdis kiel vento tra la strato, kiu plilongigis la kurejon.

Unuaj konsciiĝis la ĝendarmoj kaj policistoj kaj ekrapidis post la kurinto, kaj samtempe iuj Beglukaninoj ekkriis:

— Salko!

— Salko! . . . Salko! . . . ekkriis ankaŭ la ceteraj Beglukanoj.

— Kiu . . .? Kio . . .? Kial . . .? Kiel . . .? — amasiĝis demandoj, kaj ĉio ekbruis kaj ekkrakis, kvazaŭ ventokirlo trablovas la sekan arbaran branĉaron.

— La freneza Salko . . .! Salko Crnoŝija . . .! Filo de Raŝica . . .!

— Stana sorĉistino . . . Marta kaj Raŝica hajdukestro . . . respondadis Beglukanoj.

Kaj la strangan historion de ilia amo en ankoraŭ pli stranga formo oni rakontis rapide kaj ĵetadis de unuj al la aliaj. Tiel ĝi fariĝis pli kaj pli konfuza kaj pli kaj pli simila al rakontoj pri malbonaj feinoj kaj fantomoj, pri ensorĉitaj kasteloj kaj junuloj ŝtonigitaj.

Oni dirus, ke de la forta suna ardego ekbolis ĉiuj cerboj, ĉar iuj kun sekaj, kaj iuj kun ŝaŭmiĝintaj buŝoj, raŭkaj kaj interrompataj voĉoj, parolis malklaran kaj nekompreneblan rakonton pri la frenezeco kaj amo, kaj pri la heroeco kaj beleco.

Kaj nun, inter tiuj frenezetaj kaj furiozaj amasoj, nek estis Salko nek Stana, nek Raŝica nek Marta, — sed jam iliaj nomoj skuis la animojn kaj revivigis ilin kiel frapoj de l' tempesto en la sufokeco.

— — — — — — — — — — — — — — — —

Kiam oni aŭdis pri la amo de Salko kaj lia vagado, kaj ke li al neniu malutilas, oni ellasis lin el la arestejo

kaj diris: „Iru li en la trankvilo dia, — li ja ankaŭ tiel faras nenion malbonan".

Salko daŭrigis vagi ĉie, sed plu ne revenis al Begluk. Kaj kien ajn li venis, li rakontis ĝoje, kiel li edziĝos kun sia duonpatrino, kiam mortos lia patro kaj kiam li gajnos la ringludon.

Pro tio ili lin ne plu nomis „la freneza Salko", sed „Salko ringludano".

# ORIGINALA ESPERANTO-LITERATURO

## H. A. LUYKEN: Du Romanoj

**PRO IŜTAR.** Romano el la antikva Babela historio. 1924. 304. paĝoj. Bindita Rm 7.—

**Esperanto Triumfonta** (1924, No. 211): „ . . . vereco de la historieca fono, majstreca karakterizado de la personoj kaj eleganteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envicigas la romanon en la unuan rangon. Ĝi estas efektive unu el la plej bonaj kaj plej valoraj esperantaj original-romanoj, kiuj ĝis nun ekzistas. . . "

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „ . . . Kore mi gratulas la verkiston, kies plej nova romano estas ne nur brila pruvo pri lia talento, sed samtempe la plej valora gemo en lia verkarjuvelo. La eleganta kaj facila stilo estas ĉefa allogilo de la libro, per kiu la verko donas tian valoraĵon al la leganto, kian li ne ricevas kutime en multaj verkoj, eĉ tro laŭditaj, de nia literaturo."

**STRANGA HEREDAĴO.** Romano originale verkita. 1922. 320 paĝoj. Broŝurita Rm 5.50, Bindita Rm 7.—

**Esperanto** (1922, No. 12): „ . . . Sed neeble resumi tiun lerte aranĝitan historion. Komencinte legi ĝin, oni iras ĝis la fino, scivola pri la strangaj aventuroj, aŭ pri la sorto de l' personoj, aŭ pri la ama intrigo, kaj ne forlasas la libron antaŭ la lasta paĝo. Tio jam estas kvalito ĉe romano. Plie ĉi tiu estas verkita per flua, korekta stilo. Ĉiu samideano ne ankoraŭ leginte la novan originalan romanon de S-ro Luyken do povas havigi al si kelkajn horojn da honesta distraĵo kaj ĝudona legado."

**La Espero** (1922, No. 10): „ . . . Mi legis preskaŭ tutajn noktojn kaj ne povis ĉesi antaŭ la fino."

---

## JEAN FORGE: Du Romanoj

**ABISMOJ.** Romano originale verkita. 1923. 150 paĝoj. Broŝurita Rm 3.—, Bindita Rm 4.50

**Belga Esperantisto** (1923. No. 9/10): „ . . . Kaj lia libro certe havos honorlokon en la biblioteko de ĉiu bona Esperantisto."

**Esperanto** (1923, No. 10): „ . . . Ĉio en la libro estas laŭdinda kaj „Abismoj" estas valora riĉigo de nia originala romanaro."

**SALTEGO TRANS JARMILOJ.** Romano originale verkita. 1924. 192 paĝoj. Bindita Rm 5.—

**Literatura Mondo** (1924, No. 12): „ . . . Plastika kaj vigla stilo, facila komprenebleco, luda legebleco, jen la plej fortaj flankoj de la verko. La aŭtoro akiris por si lingvaĵojn, kiu vaksmole konformiĝas al liaj pensoj, kiu estas frapante viva kaj sugestie impresa — ĝuste per sia simpleco kaj facileco."

FERDINAND HIRT & SOHN, ESPERANTO-FAKO, LEIPZIG